

juna amiko

Februaro 2024 • n-ro 1/2024 (178)



△ Esperantistoj dum ekskurso en Valencio, apud Esperanto-Plaĝo.

Konversaciaj temoj: Familia feriado, 2-a parto.

Erasmus+: La ponto de espero en Italio, kun E-laborlingvo.

Kantu kun Juna Amiko: Dimanĉa promeno. Legu kaj ordigu!

LUDE: Ĉiu persono kun sia bezono. *Naturo:* Apro – ĉu sovaĝa besto?

Interkultura Mondo: Esperanto-Plaĝo. *Laste:* La norda pinto.

PROGRESIGA REVUO
POR LEGANTOJ
INTER 10- KAJ
100-JARAĜAJ

Ha ĉjiii

Sanon!

Kiam ni ternas, eliras tro da salivoj kiuj enhavas centojn da ĝermoj. Pro tio ni devas uzi naztukon, aŭ nia buŝo devas esti kovrita.

Dankon, Tito.

Nedankinde, Pinjo.

Ni sukcesis eniri tiun ĉi organismon.

Estu tre zorgemaj leŭkocitoj! Virusoj proksimiĝas je la gorĝo.

Ni bezonas infekti ĉelon kaj ni duobligos nin tuj.

Ek do Linjo! Ni haltigu ilin.

Haltu! Vi troviĝas en malpermesita loko. For de ĉi tie!

Ha, ha, ha

Ili atakas nin!

Ili estas multaj, ni foriru.




Enhavo



Enkonduke: Karaj amikoj! (Stano Marček, SK); Karaj legantoj! (Ahmad Reza Mamduhi, IR) 4

Konversaciaj temoj: Familia feriado, 2-a parto (Judit Felszeghy, HU) 5



Erasmus+: La ponto de espero – Erasmus+

en Italio, kun Esperanto-laborlingvo (Małgosia Komarnicka, PL 9

Kantu kun Juna Amiko: *Dimanĉa*



promeno (Małgosia Komarnicka, PL kaj José de Jesús Campos Pacheco, CU) 12



Legu: Legu kaj ordigu! (Mireille Grosjean, CH) 14



LUME: El mia kolora vivo

(Pavel Rak, CZ)..... 16

LUDE: Ĉiu persono kun sia bezono (Mónika Molnár, CH) 17



Teatraĵeto: Verda Cirko. Muzika fantazio 2 (José de

Jesús Campos Pacheco, CU kaj Odelvis del Sol, CU) 19

Historio:

La burgo de Czorsztyn kaj la legendo pri ties trezoro (Martin Pta-siński, PL) 21



Legu librojn – premioj – konkursoj: Kubo kaj ĝiaj flago,

blazono kaj legendoj. (Małgosia Komarnicka, PL; KAVA-PECH, CZ kaj José de J Campos Pacheco, CU) 22

Ideo: Kiom stultan ideon mi havis (Mireille Grosjean, CH) 26



Italaj dialektoj:

Prilingvaj pensoj de itala vilaĝano (Renato Corsetti, IT) 27



natura

Naturo: Apro – ĉu sovaĝa besto? (Renée

Triole, FR) 28

Kuirarto:

Toskano de la kuirarta flanko 2 (Aleksandra Seghi, PL) 29



Interkultura Mondo: Esperanto-Plaĝo (Elena Nadikova, RU) 31



Dolĉaĵoj: Ĉokolado: dolĉaĵo por vi, ekspluatado de afrikaj infanoj (Renée Triole, FR) 35

Krucenigmo: (Stano Marček, SK) 36

LASTE: La norda pinto (Stefan MacGill, NZ/HU) 37



Landaj Reprezentantoj – Perantoj de *Juna Amiko* ... 39

Eldonanto de *Juna amiko*: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). **Jura sidejo**: Centra Oficejo de UEA, Roterdamo, Nederlando. **Retejoj**: Ĉefaj informoj pri *Juna Amiko*: <http://ilei.info/revuoj/?lingvo=eo>.

Historio de la revuo: http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna_Amiko. La numeroj de 0 ĝis 154 (1972 ĝis 2018) publike legeblas ĉe: www.eventoj.hu/juna-amiko/. Vidu ankaŭ lernu.net kaj edukado.net.

Redaktoro: Stano Marček (Zvolenská 15/21, SK 036 01 Martin, Slovakio), stano.marcek@gmail.com aŭ redakcio@gmail.com. **Lingvaj reviziantoj**: Karine Arakeljan (Armenio), Doi Ĉieko (Japanio), Rob Moerbeek (Nederlando) kaj Utho Maier (Germanio). **Rubrikestroj**: Judit Felszeghy, Stefan MacGill (ambaŭ el Hungario), Małgosia Komarnicka (Pollando), Mónika Molnár (Svislando), Elena Nadikova (Rusio), Luiza Carol (Israelo), José de Jesús Campos (Kubo), Raita Pyhälä (Finnlando). Presita en Slovakio. **Administranto**: Hamzeh Shafiee, ilei.oficejo@gmail.com. La sekva numero aperos en Majo 2024. **Limdatoj por sendi kontribuojn**: ĝis la fino de Januaro, Aprilo, Aŭgusto kaj Oktobro. **Jarabono** € 18 en t. n. A-landoj kaj € 13 en B-landoj, laŭ la kategorioj de UEA (€ 15 kaj € 12 por mendo de 3 aŭ pli da ekz. al la sama adreso). Reta varianto: A-lande € 11, B-lande € 7.

ISSN 0230 1318



Karaj amikoj!

Komenciĝis la Nova Jaro 2024. La redakcio de *Juna Amiko* deziras al vi bonan sanon, pacon, amon, bonfarton, prosperon kaj feliĉon!

La rubriko *Konversaciaj temoj* okupiĝos pri pluaj eblaj familiaj feriadoj. Sekvos daŭrigo de “La ponto de espero” – brila projekto Erasmus + kun Esperanto-laborlingvo en la bela Italio.

En *Kantu kun Juna Amiko* vi povos kanti kun José de Jesús Campos Pacheco el Kubo kaj Eveline Paŭla el Brazilo, dum Dimanĉa promeno *tra la plaĝoj kaj rokoj ĉe l' mar' kaj tra l' arbar'*.

Kun Mirejo Grosjean el Svislando vi povas “Legi kaj ordigi” frazojn, sed ankaŭ eviti “stultajn ideojn”.

Via vivo denove fariĝos pli kolora pro la rubriko *Lume*, pli “monstra” pro la rubriko

Lude kaj iom pli verda kaj pli muzika pro plia teatraĵeto *Verda Cirko 2* kaj *Muzika fantazio de* Jesús Campos Pacheco el Kubo.

Ne mankos interesa historio pri burgo en Pollando. En *Legu kaj ĝuu* ni legos pri vojaĝo de Cezaro kaj ekkonos Kubajn flagon, blazonon kaj tri legendojn.

Ĉu vi scias, kiom da lingvoj oni parolas en Italio? Renato Corsetti klarigos tion. Kaj Renée Triolle klarigos, ke apro ne estas tute sovaĝa besto.

Kun Aleksandra Seghi ni gustumos pliajn toskanajn manĝaĵojn kaj en la rubriko *Interkultura Mondo* ni kun Elena Nadikova vizitos Esperanto-Plaĝon en Hispanio kaj insulon en Ĉinio.

Sekvos artikolo pri ĉokolado, mia krucenigo kaj en la rubriko *LASTE* ni kun Stefan MacGill malkovros nordan pinton de Nov-Zelando, la kabon Rēinga.

Agrablan legadon deziras al vi via redaktoro

Stano Marček

Karaj legantoj,

Verdire la trea boneco de la materialoj de *Juna Amiko* ĉiam estigas problemon por mi! Kion ajn mi legas, mi tentiĝas skribi pri tio, tamen en mia eta angulo eblas priskribi nur unu aŭ du!

Nun mi parolas pri tio, kion kara Maĝosia rekomendis en la rubriko “Legu kaj ĝuu”. Temas pri INK-4, t.e. la 4-a eldono de la Interkultura Novelo-Konkurso.

Laŭ mi, la konkurso estas genia iniciato por nia Movado: unuflanke ĝi pliriĉigas la literaturon de Esperanto, aliflanke ĝi tre prestiĝe prezentas nian karan lingvon al la ekstera publiko, nome al neesperantistoj.

Fakte ĉiu ajn persono povas partopreni en la konkurso per ĉiu ajn lingvo kaj per ĉiu ajn verko-nivelo. La noveloj gajnos dek premiojn inter 100 ĝis 1000 eŭroj

en du apartaj kategorioj de profesiaj kaj komercantaj verkistoj.


Laŭ la retejo de la konkurso, la noveloj povas esti “en iu ajn alia lingvo, kondiĉe ke akompanu ilin altkvalita traduko en Esperanto aŭ en la itala, kataluna, persa, rusa aŭ ukraina”. Vi povas partopreni en la konkurso maksimume per du noveloj. Ĉiu novelo povas enhavi maksimume 2000 vortojn, nome ĉ. 6 paĝoj.

Ĉar ne estas minimuma longo por la noveloj, vi rajtas skribi eĉ mikro-novelojn, t.e. rakontetojn el nur unu aŭ kelkaj alineoj! Feliĉe por fari tion vi havas sufiĉe multan tempon, ĉar la limdato por sendi la novelojn estas la 30-a de Junio 2024.

Post ĉiu konkurso, ĉiujare eldoniĝas libro, en kiu, krom la gajnintaj noveloj, aperas ankaŭ la aliaj plej bonaj noveloj, ĝuste kiel tiu libro, kiun rekomendis Maĝosia en sia rubriko.

Do, bonan novel-verkadon!

Ahmad Reza Mamduhi



Familia feriado, 2-a parto

Help-materialo por progresemuloj. Rubrikestro: Judit Felszeghy

I. Ĉu la veron aŭ la malveron diri?

Panjo (P), Patro (Pt), Katrina (K) 18-jara, Stefano (S) 15-jara kaj Dora (D) 10-jara, gefiloj babilas hejme, fine de Marto.

Pt – Alvenis la konfirmilo de la tranoktejo!
Ni veturos al la feriado la 26-an de
Aprilo, vendredon, ni certas, ke...

S – Sed mi devos ankoraŭ viziti la lernejon!

D – Kial tiel malfrue?

K – Por mi tiu tempo estas tute bona. Miaj
ekzamenoj komenciĝos nur fine de
Majo.

Pt – Steĉjo, tiam estos longa semajnfino, kaj
vi perdos nur 2 tagojn en la lernejo.

P – Dorinjo, tiam tute ne estos malfrue!
Rigardu la kalendaron! Post du
tagoj jam estos Aprilo!

Pt – Mi skribos leteron al la administrejo
de la lernejo, kaj petos konsenton
pri la malĉeesto de Steĉjo. Jam morgaŭ
vi povos kunporti tiun leteron, kaj
transdoni ĝin persone al la direktoro,
aŭ al via klasestro. Mi klarigos en la
letero, ke temas pri familia feriado, kaj
ni ne facile trovas unu semajnon, kiam
ĉiuj ni estas liberaj, kaj ne havas alian
programon.

S – Ĉu vi vere tian leteron volas skribi al la
lernejo, Paĉjo?

Pt – Jes, do, kial ne?

P – Kial vi demandas tion, Steĉjo?

S – Ĉar estas strange, ĉu ne, ke el la
lernejo oni donas forpermeson pro
malsaniĝo aŭ por partopreno en
lerneja konkurso. Se lernanto havas
interesan programon, aŭ simple ne

emas partopreni lecionon, ĉar ne estis
farita la hejmtasko, aŭ okazos skriba
pridemando, tiam li prezentas
atestilon pri gripo ekzemple.

P – Ho, ĉu pri tio la gepatroj konsentas?

S – Jes, do... Eble ne ĉies gepatroj
konsentas, sed mi scias pri multaj
okazoj, kiam la gepatroj mem skribis
la peton pri foresto el la lernejo.
Konkrete, mia samklasano fiere
rakontis, ke lia patro mem telefonvokis
la klasestrinon.

Pt – Kial li telefonvokis ŝin?

S – Por sciigi, ke Luĉjo, do, mia samklasano
ne partoprenos la lecionojn dum du
tagoj. La patro de Luĉjo rakontis, ke
lia filo devis viziti dentkuraciston,
kaj havas ankoraŭ dolorojn, ne povas
paroli, kaj mi ne scias, kion ankoraŭ
rakontis la patro.

P – Kion diris la klasestrino?

S – Nenion. Kion ŝi diru? Ŝi deziris
pliboniĝon al Luĉjo. Luĉjo certe havis
neniun problemon pri la dentoj. Lia
patro mem proponis tiun solvon.

Pt – Interese! Kial?

S – Jes, tio estis tre interesa, ĉar lia patro
volis, ke Luĉjo iru kun li al grava
futbalmatĉo en alia urbo.

Pt – Filo mia, mi ne emas elpensi ion
malveran kaj mensogi.

P – Bone edukas la patro de tiu knabo sian
filon! Jam infanaĝe li montras, kiel
deflankiĝi de la rekta, honesta vojo!

S – Panjo, vi scias malmulton pri la
nuntempaj kutimoj en la lernejo! Ĉu vi
neniam deziris malĉeesti en la lernejo,
aŭ en via laborejo?

P – Se tio okazis, tre malofte, mi ĉiam diris
la veran kaŭzon. Aŭ mi simple petis la
forpermeson, kaj mi ĉiam ricevis ĝin.





S – Sed kion ni faru, se jam ĉio estas aranĝita, kaj tamen la lernejo ne donos al mi la forpermeson?

Pt – Tiam ni ankoraŭ povos trovi alian semajnon.

II. Kiu? Kio? Kie?

Fine de Aprilo Panjo (P), Patro (Pt), Katrina (K) 18-jara, Stefano (S) 15-jara kaj Dora (D) 10-jara, gefiloj babilas en komforta, duetaĝa hotelĉambro, post la alveno.

Pt – Do, miaj plej karaj! Jen nia restadejo dum tiu ĉi semajno! Ĉu vi estas kontentaj? Ĉu ĝi plaĉas al vi?

D – Mirinde, mirinde! Kiom granda ĝi estas! Vera kameno! Kiu estas mia ĉambro?

K – Vere mirinda ĝi estas! Kien kondukas tiu ŝtuparo? Ho, plia etaĝo! Kiu dormos tie?



P – Vi kaj via frato.

S – Kiu? Miii? Kun Katrina, ĉu? Mi certe ne dormos kun ŝi!

K – Du ĉambretoj estas supre, stultulo! Memoru nur! Vi ja volonte dormis

multfoje kun mi, kiam vi estis eta, kaj vi timis resti sola en via ĉambro!

D – En kiu ĉambro mi dormos? Sur kiu lito?

P – Kun ni vi estos ĉi tie, sube.

Tiu granda kanapo estos nur via, Dorinjo.

Pt – Karaj, elpaku viajn aĵojn, kaj ni priparolu nian programon. Morgaŭ estos suna vetero, do, ni malkovru la montaron kaj faru belan ekskurson en la arbaro! Stefano estos nia gvidanto. Postmorgaŭ ni ripozos ĉe la basenoj, ni povos naĝi, ludi, kiel deziris Katrina. Dora, la sekva tago estos la via! En la proksima urbeto funkcias Amuzparko. Oni povas tie provi diversajn amuzajn veturilojn, ludojn, kaj elprovi siajn lertecon, rapidon, kuraĝon.

D – Huraaa! Bonege, bonege!

Pt – Atendu ankoraŭ, ĉar restos vendredo. Ĝi estos la tago mia kaj de Panjo. Tiun tagon ni ĉiuj restos en la hotelo, kaj vi faros ĉi tie kion vi volas. Ĉu vi konsentas?

K, S kaj D – Jes! Jes, certe!

P – Nun elpaku viajn aĵojn, poste ni iros vespermanĝi!

K – Kie estas mia dorsosako? Mi ne trovas ĝin.

Pt – Ĉu ĝi eble restis en la aŭto? Ni iru kaj kontrolu tion, mi prenos la ŝlosilon de la aŭto.

S – Kio estas en mia sako? Ha! Ĵinzo! Eĉ sandaloj! Tiuj apartenas al Katrina! Katriiinaaaa!

K – (*ĵus alveninta kun la dorsosako*) Ne krii! Mi vidis, ke en via sako estas ankoraŭ spaco. Ne okazis tragedio. Donu ilin al mi!

P – Dora, koreto mia, kion vi estas serĉanta? Tiuj ĉi estas miaj vestaĵoj! Kaj tiuj estas la pulovroj de Paĉjo. La viaj estas ankoraŭ sur la kanapo.

D – Mi ne scias, kie estas... tiu...

P – Kio, filineto?

D – Tiu... eta aĵo... pupo.

P – Ĉu pupo? Vi ja ne havas pupon, jam de jaroj!

D – Ne pupo, sed besteto. Ĝi aspektas kiel besteto.




- P – Koreto, mi ne vidis iun tian. Ĉu vi certas, ke vi kunportis ĝin?
- D – Mi involvis ĝin en iun bluan pulovron..., aŭ en iun ruĝan. Sed nun mi ne scias, ĉu mi kunportis ĝin.
- K – Ho, temas pri tiu strangaĵo en mia pulovro! Mi jam preskaŭ forĵetis ĝin! Dorinjo estu pli atenta, aŭ avertu min, se vi kaŝas ion en mian aĵon. Kio tio estas?
- D – Ĝi estas mia... – mi dormas kun ĝi.
- Pt – (*kiu dume estis for, nun reveninte*) – Karaj miaj! Ĉu vi ankoraŭ ne estas pretaj? Dum tiu tempo mi jam veturigis la aŭton al la parkumejo, kontrolis, kie estas la restoracio.
- P – Kaj ni trovis ĉion gravan, mi eĉ ordigis viajn vestaĵojn en la ŝranko.
- K – Kie troviĝas la restoracio?
- S – Kio estos por la vespermanĝo?
- D – Kiun robon mi surmetu?
- Pt – Ni ekiru fin-fine, mi estas manĝema. Mi rakontos ĉion dume. Dorinjo, vi estas bela ankaŭ en tiu ĉi robo, venu jam!
- P – Kien mi metis la ŝlosilon de nia ĉambro?... Ho, en mian mansakon! Bone, mi venos!

III. Iam ĉio finiĝas, sed restas la dolĉaj rememoroj.

Panjo (P), Patro (Pt), Katrina (K) 18-jara, Stefano (S) 15-jara kaj Dora (D) 10-jara, gefiloj babilas en sia komforta, duetaĝa hotelĉambro, post kvin tagoj, posttagmeze.

- K – Bedaŭrinde, tro rapide pasis tiuj tagoj!
- S – Morgaŭ jam mi devos viziti la studhorojn, bedaŭrinde... Kion vi estas rigardanta, Katrina?
- K – La foto-bildojn, faritajn dum tiuj tagoj.
- S – Montru ilin ankaŭ al mi, mi petas! Jen mi sidante ĉe la manĝotablo. Mi estis ĵus manĝonta la deserton. (*ridanta*)
- Ha – ha!

- K – Mi eĉ ne imagis, ke tiel grandan kvanton da deserto vi povas finmanĝi! Rigardu, kiel vi aspektas ĉi tie, vi havas belajn lipharojn el ĉokolada kremo!
- D – (*jus alveninta al ili*) – Kion vi faras? Pri kio vi ridas?
- S – Ni rigardas la fotojn, faritajn de Katrinjo. Kelkaj estas vere ridindaj. Venu ankaŭ vi por rigardi ilin!
- K – Unue tamen voku ankaŭ Panjon!
- P – (*alveninte kun Patro*) – Dora diris, ke ni tuj venu al vi. Ĉu io okazis? Ĉu iu problemo?
- S – Tute ne! Ni rigardas bildojn pri tiuj tagoj. Tio estas multe pli amuza, ol telejurnalo aŭ reklamo.
- Pt – Bonaj bildoj! Kiu faris ilin?
- D – Katrina.
- Pt – Sukcese vi kaptis la momentojn, kaj la etoson, Katrina! Ho, tio estas ĝuste mi, grimpanta sur la monteton, mi ne aspektas tre vigla ĉi tie.
- P – Tiu ekskurso estis por ni ne tre facila.
- S – Panjo, Paĉjo! Alveninte la altaĵon de la monteto vi diris, ke vi bone fartas. Paĉjo, vi laŭdis min, dirante, ke mi lerte organizis la ekskurson.
- Pt – Fakte jes, filo mia! Ni multe marŝis, multon vidis. La panoramo, la ĉirkaŭaĵo estis eksterordinara.
- K – Bonŝance la postan tagon ni ripozis dum la tuta tempo en la banejo. Rigardu, jen vi du, kuŝantaj sur ripozilito, en la ombro de palmoj apud la baseno!
- S – Ha ha! Ege amuza bildo! Ha ha! Rigardu, Panjo kaj Paĉjo estis babilantaj inter si. Abrupte Dora aŭ Steĉjo ĵetis pilkon, kaj ĝi kaŝis la kapon de Panjo! Kvazaŭ la pilko sidus sur ŝultro de Panjo, anstataŭ sur kapo!
- P – Mi rememoras! Kaj la pilko, ĵetita de vi aŭ de Dora, trafis ĝuste Paĉjon! Tion li ne trovis tiom ridinda!
- D – Tio okazis neintence!



la hotelo, kun la balkono de nia ĉambro, parto de la parko kun la abioj.

D – Paĉjo, fotu ankaŭ min kun Katnjo! (*Dora kuras al sia fratio*)

P – Karulo, fotu nin ĉiujn! Ĉu ni iru al alia loko?

K – Jes, al la rozuoj! Ek! Ni poste povos ririgardi la komfortan hotelon kaj la allogan parkon ĉirkaŭ ĝi!

Pt – Iomete pli proksimiĝu unu al la alia! Bone! La bildoj estos por ĉiam dolĉaj memoraĵoj pri nia kuna restado! Ne moviĝu nun! Ridetu! Unu... du... tri! Farite!!

Pt – Jen, jen! Sur tiu ĉi bildo Dora estis ploranta. Mi ne ofte vidas vin plori, filineto mia! Kio okazis?

D – Hm...

K – Ĝuste tial mi kaptis tiun momenton. Kiam ni vizitis la amuzan parkon, ŝi ege deziris provi la grandan radegon, sed Panjo diris, ke sola ŝi ne rajtas.

D – ... Kaj neniu volis kunveturi kun mi!

S – Kial “neniu”? Mi ja volonte estus veturinta kun vi, sed vi ne vokis min!

D – Ĉar vi ne ĉestis, Steĉjo! Vi kuris al la celpafado, kaj tiam ĉiuj iris tien. Mi restis sola kaj malĝoja...

P – Sed poste ni ĉiuj estis kune, ĉu ne, en la turniĝanta barelo!

D – Jes! Tiom multe tie mi ridis! Mi ne povis jam ekstari pro la ridego!

K – Rigardu, vi ĉiuj aspektas kiel ebruiuloj!

Pt – Mi rimarkis, Katnjo, kiom multe vi ridis pri ni ekstere, fotante nin.

P – Ho, nur pri Katrina estas eĉ ne unu bildo. Ni devas tuj fari ankaŭ pri ŝi! Eble ni iru eksteren, ankoraŭ ne estas mallume! (*La familio iras eksteren.*)

Pt – Staru tie, Katnjo, apud tiu skulptaĵo. Ĝi estas juna virino, preskaŭ tiel bela, kiel vi. Brakumu ties ŝultron, kvazaŭ vi estus parolanta al ĝi. Tre bone! Nun videblas, malantaŭ vi, parto de

Taskoj:

- I. a) Legu atente la unuopajn ĉapitrojn, kontrolu la nekonatajn vortojn helpe de vortaro, poste legu ilin laŭte, du fojojn.
- b) Poste rakontu la enhavon de la unuopaj ĉapitroj en Esperanto (aŭ en via gepatra lingvo)!
- II. a) Klarigu (laŭte, al via studpartnero) en Esperanto, kion signifas la sekvaj vortoj: *klasestro, konsenti, telefonvoki, samklasano, ĵinso, lipharoj, ripozlito, teleĵurnalo!*
- b) Rakontu, kiu serĉis kion, kaj kie tion trovis!
- III. a) Rakontu, kiu serĉis kion, kaj kie tion trovis en la hotelĉambro!
- b) Faru dialogon kun via studpartnero: Unu el vi deziras veturi eksterlanden, kun siaj edz(in)o kaj fil(in)o, dum lernoĵaro. La alia estu la klasestro aŭ instruisto, kiu ne volas doni la permeson ĝuste por tiu tempo!
- c) Imagu, ke vi estas unu el la rolantoj de la lasta ĉapitro! Rakontu, kiun tagon kion vi faris dum la feriado, surbaze de la fotoj, kiujn faris Katrina!

La ponto de espero – Erasmus+ en Italio, kun Esperanto-laborlingvo

En la pasinta numero de *Juna Amiko* mi priskribis kion oni devas fari por partopreni en la eŭropa programo Erasmus+. Daŭrigante la temon, mi nun prezentos nian ĉiutagecon en bela Italio.

En la eŭropa programo Erasmus+ partoprenis la membroj de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, Małgosia, Magda, Ryszard, Irenka, Tereska kaj Oskar. Dank' al la financa subteno de Eŭropa Unio ni povis ne nur realigi nian projekton, sed ankaŭ pasigi esceptajn momentojn en la belega Toskanio.

Laŭ la programo, ne ĉiuj el ni havis la samajn taskojn.

Magdalena kaj Małgosia observis la laboron de italaj instruistoj-esperantistoj kaj la laboron en la biblioteko. Dank' al tio ili ekkonis la italan edukan kaj bibliotekan sistemon. Ili havis ankaŭ eblecon observi la ekzamenon de la lingvo Esperanto, kiu estis organizita de la Itala Instituto de Esperanto. Tia rekta kontakto estis tre grava afero en la eduka procezo de Magdalena kaj Małgosia. Ili konstatis, ke la itala eduka sistemo diferencas de la pola sistemo en multaj rilatoj. Ĝi estas pli amika, ĉar la studento estas en la centro kaj instruisto-lekciisto havas eblecon fariĝi



Nia grupo dum la unua tago en la restoracio.



kreinto de siaj propraj programoj, kiuj stimulas la kreemon de la studentoj.

Vizitante la Nacian Bibliotekon kaj Arkivon de Esperanto en Massa (*Biblioteca nazionale e archivio di Esperanto*) ili estis surprizitaj, vidante ĝian abundan E-kolekton. Ĝi superis iliajn atendojn. Magdalena kaj Małgosia kun admiro observis la laboron de Enrico Gaetano Borrello, kiu dum jaroj katalogas Esperantajn kolektojn kiel volontulo: librojn, gazetojn, dokumentojn... – kelkaj el ili estis kreitaj antaŭ pli ol 100 jaroj. Dum libera tempo polaj partoprenantoj de la programo Erasmus volonte helpis al Enrico en la biblioteko katalogi librojn, revuojn, dokumentojn...

Irenka, Tereska, Ryszard kaj Oskar havis aliajn taskojn. Ĉiutage ili plibonigis sian konon de Esperanto je baza kaj alta niveloj kaj unufoje semajne ili partoprenis en elektitaj laborsesioj, okazigitaj en Esperanto (cifereco, ekologio, mnemoniko* kaj demokratio). En Pollando neniu el la partoprenantoj havus la ŝancon lerni la lingvon Esperanto kaj en ĝi paroli ĉiutage kun eksterlandanoj.

Ni ĉiuj revenis al Pollando kun novaj spertoj kaj kapabloj, kiujn ni akiris dank' al partopreno en la programo Erasmus+. La tuta teamo kuraĝe partoprenis en la internacia AMO-Seminario "Virinoj, kiuj



La ambasadorino kaj Małgosia.

ŝanĝis la mondon", en Esperanto. Malgraŭ tio, ke la aŭtoroj ofte uzis malfacilajn esprimojn en siaj prelegoj, ni konstatis, ke nia lingvokono de Esperanto multe pliboniĝis. Kelkaj el ni, antaŭ ol efektiviĝi nian projekton, absolute ne kapablus kompreni eĉ malgrandan parton de la prelegoj...

Dank' al nia partopreno en la projekto Erasmus+ ni unufoje vizitis la Polan Konsulejon kaj ankaŭ Florencon. Dum tiu ĉi vizito, en akompano de lokaj esperantistoj, ni havis la eblecon vidi laborlokon de la honora konsulo Stefano Barlacchi kaj proksimigi al li nian projekton Erasmus+. La konsulo ne parolas la polan kaj do Esperanto perfekte ludis la rolon de la "ponto-lingvo".

Laŭ la invito de la konsulo ni ankoraŭ dufoje vizitis Florencon. Ni partoprenis en unika kuirarta konferenco, dediĉita al la scio kaj gustoj de Mezeŭropo,



En Florenco.



organizita en la bela Palaco Coppini. Dum la konferenco ni aŭskultis prelegojn de eminentaj gastoj pri la kulturo kaj historio de manĝaĵoj, antikvaj kaj modernaj gustoj, ekologio, receptoj, produktoj, ktp. Ni provis ankaŭ pretajn pladojn.

Por ni, poloj, tre grava estis partopreno en eksterordinara koncerto okaze de la Nacia Festo de Sendependeco de Pollando, kiu estis organizita en la bela Teatro Niccolini. Dum ĝi ni havis la eblecon paroli kun la ambasadorino de la Respubliko de Pollando Anna Maria Anders kaj rakonti al ŝi pri nia projekto Erasmus+. La tuta programo estis unika: mallonga prezento de la historio pri reakiro de sendependeco de Pollando, mallongaj paroladoj, bela muziko, la pola himno kune publike kantita kaj fine gustumado kaj multaj neforgeseblaj impresoj.

Granda travivaĵo estis partopreno en gazetara konferenco kaj en grava Esperanto-aranĝo Zamenhofa Aranĝo Toskana 2023. Tiuj ĉi du aranĝoj okazis en historia konstruaĵo en Pizo, en la plej bela salono, la Baleara Salono (*La sala delle Baleari*) en unu el la plej famaj palacoj, en la Palaco Gambacorti (*Palazzo Gambacorti*), nuntempe la urbodomo, la sidejo de la urbaj aŭtoritatoj. En la Zamenhofa Aranĝo Toskana 2023 partoprenis ne nur esperantistoj el Eŭropo, sed ankaŭ el ekster ĝi. Tre gravaj gastoj dum la unua tago estis Stefano Barlacchi, la pola konsulo, kaj Filippo Bedini, la reprezentanto de la Piza Kultura Departemento. La sola prelego tiutage estis prelego, prezentanta nian tutan projekton "Ponto de Espero. Nova kvalito de Esperanta lingvoinstruado", prezentita de Małgosia Komarnicka. Ĝi estis la unua ampleksa publika prezento de nia projekto.

Dank' al nia projekto, kiun ni realigis kadre de la programo Erasmus+, financita de Eŭropa Unio, ni multe ellernis, ekkonis la kulturon kaj multajn mirindajn, historiajn lokojn de Italio, kiujn ni ĝis nun konis nur de literaturo. Tiujn belajn lokojn mi



Kun la konsulo Stefano Barlacchi.

priskribos venontfoje... Eble vi planos libertempan viziton en Italio...

Ni kuraĝigas vin partopreni en eŭropaj programoj, kiel ekz. Erasmus+, ĉar ili vere enkondukos en vian vivon novan kvaliton.

Małgosia Komarnicka
(Kuniniciatintino kaj gvidantino de la projekto Erasmus+)

Noto de la redakcio: Małgosia kun la vrocłava Esperanto-grupo vizitis la prezidanton de Vroclavo, kiu tre interesiĝis pri *Juna Amiko*. En la venonta numero aperos artikolo pri la vizito.





La sorĉa kanto-mondo

La rubrikon preparas Małgosia Komarnicka
malgosia.junaamiko@gmail.com



Kanto akompanas nin ĉie... Ni volonte aŭskultas ĝin, ĉar ĝi helpas vidi kaj krei alimaniere la mondon, ebligas revii, aŭ transdoni niajn sentojn.

Ĝi ankaŭ helpas akiri pli bonajn rezultojn dum lernado, ĉar lernantoj, kantante, samtempe lernas, kreskigas sian emocian engaĝiĝon en la lerno-procezo. Sufiĉas nur ekkanti – kaj ili tuj memoras la kanto-vortojn. Tiamaniere la lernantoj plej bone kaj sugeste alproprigas al si la materialon de la leciono, ofte ne konsciante, ke ili ekzercas sin pri fremda lingvo.

La laboro kun kanto sentigas ĝojon kaj kontenton al la lernantoj, kaj do ni ne malhelpu ĉi tiun agrablecon de kantado dum la Esperanto-lecionoj.

Komencante novan jaron ni planu ankaŭ multe promeni por la sano kaj kompreneble kanti. Belan kanton proponas José de Jesús Campos Pacheco el Kubo, esperantisto, instruisto de la lingvo Esperanto kaj longdaŭra kunlaboranto de *Juna Amiko*.

La kanton vi povas aŭskulti, vizitante la paĝaron “Brazila Kolekto”:

<https://mallonge.net/promeno>

Ĝin kantas kaj gitarludas Eveline Paŭla.

Dimanĉa promeno

*En dimanĉo tre taŭgas promeno
tra la plaĝoj kaj rokoj ĉe l' mar'*

*Mi leviĝas en frua mateno
kaj salutas min gaja birdar'.*

Kantu gaje, amikoj flugilaj!

Estas bela ĉi tiu maten'!

Mi vin dankas pro l' kantoj ĝentilaj!

Estas horo por nia promen'.

*En dimanĉoj kun bela vetero
tra l' arbaro mi marŝas kun ŝi.*

*En arbar' estas pura aero,
kiu savas nin de l' poluci'!*



Eveline Paŭla

La kanton “Dimanĉa promeno” (originala titolo “Red River Valley”) vi ankaŭ trovos en la libro “100 jaroj da kantado”, kiun verkis kaj kompilis Sylla Chaves kun muzika konsilado de Alfredo Aragón. La libron eldonis en la jaro 1989 Kultura Kooperativo de Esperantistoj en Rio-de-Janeiro.

Post la kantado, bonvolu nun respondi jenajn demandojn:


1. Ĉu vi promenas kun via familio aŭ kun viaj geamikoj dimanĉe? Kien vi iras?
2. Ĉu al vi plaĉas promeni tra la urbo aŭ tra la arbaro aŭ plaĝo dimanĉe? Kial?
3. Ĉu vi ankaŭ promenas dum vintra sezono dimanĉe?
4. Ĉu dimanĉe vi tre frue ellitiĝas por promeni?
5. Kion vi faras dimanĉe? Ĉu vi sidas sur benko en parko kaj parolas kun viaj geamikoj?
6. Ĉu, laŭ vi, valoras promeni? Kial?

Kantu kaj lernu!

Bonvolu sendi al mi proponojn de viaj naciaj kantoj, por ke la legantoj de *Juna Amiko* havu la eblon ekkoni belajn kantojn el la tuta mondo:

malgosia.junaamiko@gmail.com

Sylla Chaves



Sylla Chaves (1929 - 30^a de majo 2009) estis brazila UN-officisto, verkisto, pedagogo, aktivulo en la brazila Esperanto-movado kaj membro de la Akademio de Esperanto por la periodo 1986-1996, honora membro de la UEA ekde 1992.

Chaves magistriĝis pri komunikado en Stanford (Usono) kaj ankaŭ studis juron en Rio-de-Janeiro, cibemetikan pedagogion en Paderborno (Germanio) kaj politikan sciencan en Parizo.

Li esperantiĝis en la 1930-aj jaroj kaj estis prezidanto de la Brazila E-Ligo en 1978-82. Li estis premiita en pluraj belartaj konkursoj de UEA, kaj verkis liaj aperas en diversaj Esperantaj antologioj.

Plurajn librojn kaj vinilajn diskojn kaj kasedojn li eldonis, ĉefe instruoj.

(Fonto: Vikipedio)

Dimanĉa promeno

Usona popolokanto (Red River Valley)
Versio de Sylla Chaves

♩=180

G C G

En di - man - ĉo tre taŭ - gas pro - me - no _____ tra la
ga - je, a - mi - koj flu - gi - laj! _____ Es - tas
man - ĉoj kun be - la ve - te - ro _____ tra l' ar -

5 D

pla - ĝoj kaj ro - koj ĉe l' mar' _____ Mi le -
be - la ĉi ti - u ma - ten'! _____ Mi vin
ba - ro mi mar - ŝas kun ŝi. _____ En ar -

9 G G7 C

vi - ĝas en fru - a ma - te - no _____ kaj sa -
dan - kas pro l' kan - toj ĝen - ti - laj! _____ Es - tas
bar' es - tas pu - ra a - e - ro, _____ ki - u

13 G D G 1.2. 3.

lu - tas min ga - ja bir - dar' _____ Kan - tu
ho - ro por ni - a pro - men'! _____ En di -
sa - vas nin de l' po - lu - ci!

Mireille Grosjean

Legu kaj ordigu!

Nova vivo

Sed ĉu vere temas pri hazardo?

Enŝipiĝi estis kortuŝa momento, emocioplena kaj ne forgesbla.

Ŝi eĉ iris al Laŭzano por akiri precizajn respondojn al siaj multaj demandoj.

Ŝi volis iom pli vaste koni la mondon kaj fari utilan laboron.

Tute ĝoja ŝi iris al poŝtoŝejejo por porti la valoran koverton de sia kandidatigo.

Eĉ kelkaj larmoj falis el ŝiaj okuloj laŭ ŝiaj vangoj.

Ek al nova vivo!

Ŝia laboro en tiu ĵurasa urbo estis ofico en la vendado en firmao pri horloĝfarado.

La diskuto en Laŭzano en la gvida asocio daŭris longe, la oficistoj de la organizo por Mercy Ship tre ĝojis renkonti junan ageman virinon kaj ŝi mem estis tre feliĉa pli precize kompreni la ĝeneralan organizadon de tia entreprenon.

Nun venas nova tasko: decidi pri tio, kion ŝi kunportu. “Kion mi bezonos sur la ŝipo, kion mi kunportu?”

Melody loĝis en La Caux-de-Fonds, Svislando.

Ili koruse bonvenigis ŝin.

Ĉu sur tiu ŝipo estas ia tasko por persono sen konoj pri sano kaj kuracado?

Ŝi esploris por trovi novan postenon, kie ŝi povus helpi al aliaj homoj.

“Jes! Tian aventuron mi deziras fari, mi vere volas fari utilan laboron.”

Finfine venis la tago, kiam ŝi devis kun peza valizo veturi al la kanariaj insuloj, kie la ŝipo pretis por iri al Dakaro.

Reveninte hejmen, ŝi diskutis kun siaj parencoj kaj amikoj, tiuj diskutoj helpis

al ŝi fari decidon.

Rapide ŝi prenis naptukon por viŝi ilin.

Daŭris du semajnojn, ĝis ŝi ricevis pozitivan respondon: “Ni ĝoje akceptas vin en nia surŝipa skipo”. “Via laboro estos mastrumi la okupadon de la operaciĉambroj kaj la laborplanon de la kuracistoj kaj flegistoj.”

Tiam ŝi aŭdis pri Mercy Ship tute hazarde.

Ŝi devis iri duan fojon al Laŭzano al la baza oficejo de Mercy Ship por dungcela intervjuo.

Unue ŝi informiĝis pri tiu ŝipo kaj pri la asocio, kiu financas tian valoran entreprenon.

Post kelkaj tagoj ŝi ricevis dokumentojn pri la posteno, kiujn ŝi rapide sed atenteme pleniĝis.

Farante tion, ŝi komprenis, ke temas pri enŝipa malsanulejo, kiu iras de haveno al haveno por kuraci la loĝantojn de la urbo, kie situas la haveno.

Reveninte el Laŭzano ŝi multe pripensis.

La postan tagon ŝi telefonis al Laŭzano por anonci sian decidon.

Ŝi ne havas ian lertigadon pri flegado kaj kuracado, tamen tia vojaĝo utila kaj valorata tre interesus ŝin.

Leginte tiun pozitivan mesaĝon, ŝi kriis pro ĝojo kaj invitis kelkajn amikojn por festi kun ili pri sia nova vivo.

Do ŝi ekrilatis kun la organizantoj en Laŭzano.

“Ĉu mi forlasu mian nunan postenon por enŝipiĝi kaj labori sur tiu ŝipo?”

Sur la ŝipo ŝi konaitiĝis kun la teamo, kun siaj novaj kolegoj.





SOLVO:

Melody loĝis en La Caux-de-Fonds, Svislando. Ŝia laboro en tiu ĵurasa urbo estis ofico en la vendado en firmao pri horloĝfarado. Ŝi volis iom pli vaste koni la mondon kaj fari utilan laboron. Ŝi esploris por trovi novan postenon, kie ŝi povus helpi al aliaj homoj. Tiam ŝi aŭdis pri Mercy Ship tute hazarde. Sed ĉu vere temas pri hazardo? Unue ŝi informiĝis pri tiu ŝipo kaj pri la asocio, kiu financas tian valoran entreprenon. Farante tion, ŝi komprenis, ke temas pri enŝipa malsanulejo, kiu iras de haveno al haveno por kuraci la loĝantojn de la urbo, kie situas la haveno. Ŝi ne havas ian lertigadon pri flegado kaj kuracado, tamen tia vojaĝo utila kaj valora tre interesus ŝin. Do ŝi ekrilatis kun la organizantoj en Laŭzano. Ŝi eĉ iris al Laŭzano por obteni precizajn respondojn al siaj multaj demandoj. La diskuto en Laŭzano en la gvida asocio daŭris longe, la oficistoj de la organizo por Mercy Ship tre ĝojis renkonti junan ageman virinon kaj ŝi mem estis tre feliĉa pli precize kompreni la ĝeneralan organizadon de tia entrepreno. Reveninte el Laŭzano ŝi multe pripensis. “Ĉu mi forlasu mian nunan postenon por enŝipiĝi kaj labori sur tiu ŝipo? Ĉu sur tiu ŝipo estas ia tasko por persono sen konoj pri sano kaj kuracado?” Reveninte hejmen, ŝi diskutis kun siaj parencoj kaj amikoj, tiuj diskutoj helpis al ŝi fari decidon. “Jes! Tian aventuron mi deziras fari, mi vere volas fari utilan laboron.” La postan tagon ŝi telefonis al Laŭzano por anonci sian decidon. Ŝi devis iri duan fojon al Laŭzano al la baza oficejo de Mercy Ship por dungcela intervjuo. Post kelkaj tagoj ŝi ricevis dokumentojn pri la posteno, kiujn ŝi rapide sed atenteme plenigis. Tute ĝoja ŝi iris al poŝtofiĉejo por porti la valoran koverton de sia kandidatigo. Daŭris du semajnojn, ĝis ŝi ricevis pozitivan respondon: “Ni ĝoje akceptas vin en nia



surŝipa skipo”. “Via laboro estos mastrumi la okupadon de la operaciĉambroj kaj la laborplanon de la kuracistoj kaj flegistoj.” Leginte tiun pozitivan mesaĝon, ŝi kriis pro ĝojo kaj invitis kelkajn amikojn por festi kun ili pri sia nova vivo. Nun venas nova tasko: decidi pri tio, kion ŝi kunportu. “Kion mi bezonas sur la ŝipo, kion mi kunportu?” Finfine venis la tago, kiam ŝi devis kun peza valizo veturi al la kanariaj insuloj, kie la ŝipo pretis por iri al Dakaro. Enŝipiĝi estis kortuŝa momento, emocioplena kaj ne forgesebla. Eĉ kelkaj larmoj falis el ŝiaj okuloj laŭ ŝiaj vangoj. Rapide ŝi prenis naktukon por viŝi ilin. Sur la ŝipo ŝi konatiĝis kun la teamo, kun siaj novaj kolegoj. Ili korse bonvenigis ŝin. Ek al nova vivo!

Mireille Grosjean
laŭ dokumento de Mercy Ship




El mia kolora vivo

Verkinto kaj desegninto: Pavel Rak



Kolorigu la suban bildon laŭ la supra! Kion vi vidas sur la bildoj?
Kiom da diferencoj en la du bildoj vi trovis?

Ĉiu persono kun sia bezono




La rubrikon prizorgas: **Mónika Molnár**

Apenaŭ komenciĝis la jaro, tamen pasis jam pli ol monato. Iun tagon la ulidoj revenis hejmen tute ekscititaj kaj ne vere en paca etoso. La gevoj hezitis ĉu interveni aŭ atendi iomete. Finfine ili tute ne bezonis demandi ion ajn, ĉar Ŝercemulido parolis tiom laŭte, ke eĉ la najbaroj povintus aŭdi lin: – Jes! Ĝi estos tre bona! Kaj jes, mi rajtos fari kion mi volos dum tiu festo, eĉ se tio malplaĉos al vi, kara Timemulido! – diris li iom mokete.
– Ne! Mi ne konsentas. Vi devas resti ĝentila! Eĉ se vi surhavas maskon, eĉ



tiam vi restos vi kaj... Kaj se ne estas tiel, mi eĉ ne volos iri al tiu festo, ĉar mi jam nun timas... – diris Timemulido kaj li ekploretis. La gevoj rapide eksciis, ke la lerneja maskobalo kaŭzis la disputon inter la ulidoj. Ŝercemulido kaj la tuta klaso volis vesti sin je diversaj monstroj kaj kondukti kiel monstroj dum tiu tago. Kompreneble Timemulido eĉ aŭdi ne volis pri tio, ja li timis la monstrojn. La gevoj sciis, ke foje li eĉ timas, ke monstroj kaŝas sin sub lia lito... En tiu momento ili ekhavis la ideon rakonti al Timemulido la rakonteton de Enya, kiu parolas pri io, kio povus kuraĝigi kaj helpi la etulon. Jen ĝi:


<p>Enya Delley: Sub lito</p>	<p>Mana vekigiĝis en la nokto. Ŝi aŭdis iun nenormalan bruon. Sed ŝi vekigiĝis ne vere pro tio, sed ĉar ŝi devis iri al la necesejo. Do, duon-veke, duon-dorme ŝi iris al la necesejo.</p>	<p>Dum ŝi estis en la necesejo, daŭre ŝajnis al ŝi aŭdi ion. Poste ŝi reiris en sian ĉambron, kie ŝi denove aŭdis la nenormalan bruon. Ŝi komencis serĉi de kie ĝi povas veni. Ŝi rigardis sub...</p>



... sub la liton kaj ŝi vidis... 5 malgrandajn monstrojn! Ŝi ne kriis, nur miris: „Kiu vi estas?” La 5 monstretoj mirigite respondis: „Ni estas monstraj! Ĉu vi ne vidas?” Kaj la monstretoj komencis paroli inter si: „Ŝi estas bela! Ŝi estas kuraĝa! Sed ŝi ne vere estas saĝa. Ŝi estas iom blinda...”

Mana ridetis kaj respondis: „Mi ne estas blinda, sed mi ne sciis. Mi neniam vidis monstrojn antaŭe! Ĉefe ne sub mia lito! Kiel vi nomiĝas?” La kato-diablo nur skuis la kapon kaj diris: „Mi nomiĝas Suno. La 3 etaj dentoj estas Nomi, Noma kaj Nojno. Kaj la birdo-horloĝo nomiĝas Dingu.

„Ho, vi estas tre ĉarmaj! Dankon, ke vi elektis mian liton! Ĉu vi havas eble eĉ magiajn povojn?” – demandis Mana. „Jes, kompreneble!” – respondis Suno. „Hoo! Ĉu vi povas montri ilin al mi? Bonvolu!!!” Suno ekridis kaj respondis: „Hahaha! Bone, bone. Jes, ni povas montri ilin al vi. Rigardu! Ek!”



Suno fermis siajn okulojn kaj komencis ŝanĝiĝi. „Ho, vi ŝajnas brili!” – kriis mirigite Mana. Suno referis tion ankoraŭ kaj ankoraŭ, fine ĝi ĉesis. Poste Dingu rigardis fikse al Mana kaj... ĝiaj plumoj ekŝanĝis diversajn kolorojn. „Kaj la 3 dento-monstretoj?” „Ili ne havas magiajn povojn...” – diris Dingu.

„Sed se vi, Mana, volas magiajn povojn, tiam venu kun ni en nian mondon de paco!” „Jes! Venu kun ni!” – diris Suno. Mana ridetis kaj tion respondis: „Dankon, sed ne. Mi ne bezonas iri en vian mondon, ĉar mia magia povo kaj mia paco estas jam en mia koro.” La monstretoj komprenis kaj akceptis la respondon.

– Ho, mi tre ŝatis tiun ĉi rakonton! – diris fine Timemulido. – Mi ĉiam pensis, ke la monstroj certe estas monstre timigaj, sed tiujn 5 monstretojn mi tre volonte renkontus! Eble mi petus de ili la magian povon esti kuraĝa! Sed... eble mi ne kuraĝus iri kun ili por havi ĝin... Mi devas tion iom pripensi... Tamen, ili ja helpis min per bona ideo! Por la maskobalo mi vestos min je Dingu, la ĝentila birdo-horloĝo kaj tiel ĉiuj povos kontenti! ☺

Verda Cirko 2

En la domo de Reĉjo

Avino: Reĉjo, la estro de la cirko Verda Espero invitas vin ludi fluton tie dum besta trejnad. Tiuj hundetoj divenos numerojn per bojado, la trejnisto montros ilin al la hundetoj – kaj poste vi ludos fluton kaj ili dancos. Tiuj hundetoj troviĝis surstrate kaj la trejnisto gardas ilin ekde tiu tago kaj trejnis ilin por cirka spektaklo. Jen la invitilo. Mi iros al la kuirejo por baki torton...

En la cirko Verda Espero

Deĉjo (*pripensas*): Mi volus rolludi kiel klaŭno, sed mia patro ĉiam parolas pri la graveco esti ĵonglisto, ĉar en nia familio ni ĉiuj estas ĵonglistoj. Kion mi faru?

Estro de la cirko (*per laŭtparolilo*): Je la oka la cirko Verda Espero donacos spektaklon plenan de fantazio... Ni atendas vin.

Reĉjo alvenas al la cirko, kiu troviĝas en la parko.

Besta trejnisto: Saluton, Reĉjo! Ni eklaboru iomete antaŭ la vespera prezentado... Ek do!

Minutojn poste ĉe la enirejo de la cirko:



Reĉjo: Saluton! Kial vi malfeliĉas?

Deĉjo: Mi helpas mian patron dum ĵonglad- spektaklo. Sed mi volus esti klaŭno. Mia patro ĉiam parolas, ke en nia familio ĉiuj devas daŭrigi en la tradicio. Sed...

Reĉjo: Mi havas ideon...

En tiu ĉi vespero vi surprizos ĉiujn kaj mi invitas vin helpi nin en la spektaklo kun la hundeto... Venu kun mi hejmen.

Dum la vespera prezentado:

Estro de la cirko: Nun Reĉjo ludos fluton kaj poste la hundetoj divenos numeralojn.

Reĉjo ludas fluton dum la trejnisto rolludas kun la hundetoj.

Trejnistoj montras bildojn:

$(2 + 2)$: Unu hundeto bojas kvar-foje.

$(2 - 1)$: La alia hundeto bojas unu-foje.

Ĉiuj aplaŭdas.


Poste Reĉjo kaj Deĉjo survestas kostumon kaj aktoras kune kiel spritaj klaŭnoj. Inter la publiko troviĝas la patro de Deĉjo kaj la avino de Reĉjo, kiu aplaŭdas ilin.

Post la fino de la prezentado:

Avino de Reĉjo (*al Deĉjo*): Reĉjo parolis pri via malgajeco kaj mi parolis kun via patro kaj...

Patro de Deĉjo: Vi pravas, kaj vi Deĉjo povas rolludi kiel klaŭno... Mi helpos vin





ĉiam en viaj decidoj, karuleto.

Avino de Reĉjo: Nun mi invitas vin gustumi la torton.

Ĉiuj feliĉas kaj manĝas torton.

Verkis: **José de J. Campos Pacheco** (Kubo)

Bildoj: **Odelvis del Sol** (Kubo).

Muzika fantazio



Divenludo pri muzikinstrumentoj

1. (8 literoj): Muzikilo, konsistanta el ligna aŭ metala tubo kun truoj kaj klavetoj, en kiun oni lipblas per flanka truo.

2. (5 literoj): Granda triangula muzikinstrumento, staranta sur sia bazo kaj provizita per vertikalaj diverslongaj kordoj, kiujn oni vibrigas per ambaŭ manoj.

3. (9 literoj): Kupra blovmuzikilo kun klapoj.

4. (7 literoj): Muzika instrumento, konsistanta el malplena cilindro, kies ambaŭ bazaj flankoj estas fermitaj per du

maldikaj streĉitaj lamenoj el ledo, kiujn oni frapas per bastonoj.

5. (9 literoj): Portebla blovinstrumento kun klavaro, en kiu oni estigas sonon alterne tirante kaj puŝante rektangulan faldblovilon.

6. (6 literoj): Muzika kvar- aŭ ses-korda instrumento, per kiu oni ludas pinĉante la kordojn.

7. (5 literoj): Muzikilo pli forta ol fortepiano kun vertikalaj kordoj kaj klavaro.

8. (4 literoj): Antikva korda muzikilo.

En la magia kvadrato vi devas trovi la muzikajn instrumentojn, kiujn Reĉjo konis, kiam li estis kun la feino Verda Stelo en Afriko, Azio, Oceanio kaj Ameriko. Ĉu vi memoras ilin?



A	K	O	R	D	I	O	N	O	G
H	O	N	Ŝ	N	K	I	A	T	I
M	T	A	M	B	U	R	O	E	T
K	E	I	O	Ĝ	N	A	B	I	A
U	O	P	R	A	H	T	E	F	R
E	R	H	U	O	T	L	I	R	O
D	S	B	E	K	F	L	U	T	O
T	O	B	M	I	R	A	M	A	S
S	A	K	S	O	F	O	N	O	D
H	D	I	Ĝ	E	R	I	D	U	O



La burgo de Czorsztyn kaj la legendo pri ties trezoro

En la sudo de Pollando, ĉe la landlimo kun Slovakio, situas ĉeborde de la montara rivero Dunajec mezepoka burgo – fortikigita kastelo el la 14-a jarcento.

La rivero Dunajec ĝuste surpiede de tiu burgo retenigas al laĝeto, dum la burgo mem sur monteto superas la belegan montaran pejzaĝon. Ĉio ĉi donas la perfektan, poŝtkartecan bildon, kiun multaj poloj konas – eĉ tiuj, kiuj ankoraŭ neniam estis en Czorsztyn.

Klaras, ke tia perfekta burgo (aŭ pli bone dirite: burga ruino) plenas de legendoj kaj fabeloj, de mirindaj kaj misteraj okazintaĵoj ene de siaj kelkcentjaraj muroj.

Unu de tiuj legendoj mi nun ŝatus rakonti al vi. Ĝi temas pri du paŝtistaj knaboj, kiuj vivis en vilaĝo, situanta ie en la ĉirkaŭaĵo de la burgo. La du paŝtistaj knaboj iam aŭdis la onidiron, ke en la profunda kelo de la burgo estas kaŝita trezoro de oro kaj arĝento. La du knaboj decidis, ke ili kune serĉu kaj trovu la trezoron, por iĝi riĉaj kaj por ke ili kune kun siaj familioj povu asecuri la vivon de malriĉaj paŝtistoj. Luvespere do ili kaŝiris al la burgo, kiu jam ne plu estis enloĝita aŭ de iu ajn gardata.



Ili ne longe serĉis la enirejon en la kelon. Sed enirinte la kelo montriĝis vera subtera labirinto, tamen la du knaboj tiom ardis por trovi la trezoron, ke ili pli kaj pli iris en la profundaĵon de la labirinto. Kaj jen, ili trovis la trezoron! La oro kaj la arĝento brilis en la lumo de iliaj kandeloj. Avide la knaboj kolektis la monerojn el oro kaj arĝento kaj ekserĉis la vojnon reen – sed ili perdiĝis en la subtera labirinto! Ili vagadis en ĝi la tutan nokton, serĉis elirejon – kaj jen, kiam ekstere jam mateniĝis, ili ĝin trovis! Ili eliris el la burgo, iris al sia vilaĝo kaj ĝojis pri la trovita trezoro. Sed kiam ili alvenis en sian vilaĝon, ili ĝin ne plu rekonis: la vilaĝo estis forlasita, kvazaŭ jam antaŭ jardekoj, neniu plu loĝis tie, la domoj estis putrintaj kaj la puto sen akvo. Kio okazis? Evidentiĝis, ke tio, kio por la du knaboj estis unu punkto, por la mondo estis tuta jarcento! Neniu el ilia familio vivis plu, ilia domo ne plu ekzistis. La trezoro el oro kaj arĝento subite perdis sian valoron por la knaboj. Ili forlasis sian putrintan hejmvilaĝon kaj iris en la mondon, serĉante novan hejmon kaj novan vivon. Ni ne scias, kio okazis al ili kaj al la trezoro – sed ni scias, ke oro kaj arĝento ne estas la plej valoraj aĵoj en la mondo...

Martin Ptasinski





Legu kaj ĝuu

Rubrikestro:

Małgosia Komarnicka

Pollando

malgosia.junaamiko@gmail.com



La libro estas bona por ĉio...

Aĉetante libron vi plezurigas vin aŭ aliulojn, ĉar la libro estas perfekta donaco. Kredu, ke en la tempoj de komputiloj, saĝtelefonoj kaj poŝtelefonoj, papera libro estas pli proksima al la animo...

Ni estas generacio, kiu konas la ciferecan kaj analogan mondojn, ofte forgesante, kiujn danĝerojn portas manko de legado de libroj. La legado estas perfekta gimnastiko de

la menso kaj ekzerco de la imago.



Finalistaj noveloj de la dua eldono de la Interkultura Novelo-Konkurso

KAVA PECH

la menso kaj ekzerco de la imago.

Karaj legantoj, ne forgesu, ke la legado devas esti same grava kiel spirado, manĝado kaj moviĝado!



Klubo de bona libro

La Biblioteko de *Juna Amiko* por junuloj kaj infanoj kreskas dank' al viaj proponoj. Bonvolu sendi viajn proponojn de libroj, kiuj montras pozitivajn valorojn (ekzemple toleremon, amikecon, apogon al malpli fortaj homoj), helpas kompreni vin mem kaj aliajn kaj ebligas adaptiĝi al nia iom malgaja realeco. La proponojn kun titolo, aŭtoro kaj mallonga rekomendo, sendu al la supra adreso, aldonante la noton: Biblioteko de *Juna Amiko*.

Rekomendo

Por la Biblioteko de *Juna Amiko* mi rekomendas la libron "La lasta vojaĝo de Cezaro kaj aliaj noktaj aventuroj", kiun eldonis la eldonejo "KAVA-PECH" en la jaro 2023 en Dobřichovice.

La libro enhavas la finalistajn novelojn de la Interkultura Novelo-Konkurso de Bobelarto. Bobelarto estas iniciato, kiu subtenas literaturon en la lingvo Esperanto. Ĝin fondis la teamo de entuziasmaj esperantistoj, kiuj verkas, legas kaj diskutas pri literaturo, organizas konkursojn kaj kuraĝigas homojn ekverki



kaj partopreni en la literatura vivo de Esperantujo.

La redaktoroj de la libro estas François Bolduc kaj Jaes Estrada.

En la libro troviĝas originale verkitaj rakontoj en Esperanto, sed ankaŭ kelkaj el ili en la originala lingvo (en la franca, itala, rusa kaj ukraina).

Mi invitas la legantojn de *Juna Amiko* partopreni en la Interkultura Novelo-Konkurso. Vizitu la paĝaron: <https://bobelarto.ink/eo/konkurso/> kaj verku novelojn kun la temo “Artefaritaj intelektoj, pensantaj maŝinoj kaj Homo sapiens”.

Interkultura Novelo-Konkurso estas literatura konkurso, organizata de Akademio Literatura de Esperanto, kunlabore kun Bobelarto kaj aŭspiciata de Universala Esperanto-Asocio. Ĝi celas instigi novel-kreadon de aŭtoroj el diversaj kulturoj je la sama temo...

Kubo kaj ĝiaj flago kaj blazono

Kubo estas unika insulo kun fabelaj kuraclokoj kaj antikvaj aŭtoj. Troviĝas tie la plej belaj strandoj de la mondo, riĉa arta vivo, amuzaj kluboj kaj escepta arkitekturo kun unikaj koloniaj monumentoj. De tie devenas la plej famaj cigaroj kaj rumo...

La flagon kaj blazonon de Kubo kiel kutime priskribas itala esperantistino Cristina Bollini (fine estas informo pri ŝia libro).



Kuba flago estis oficiale adoptita en la jaro 1902, sed jam en la jaro 1850 oni uzis flagon kun la samaj koloroj. Oni diras, ke la koloroj devenas de la usona kaj la franca flagoj, kaj estas en ĝi revoluciaj simboloj pro la idealoj kaj la aspiroj, kiujn ili esprimas.

La tri bluaj strioj rilatas al la tri provincoj de Kubo de la 19-a jarcento kaj la du blankaj strioj al la pureco de la kubaj idealoj. La ruĝa triangulo rememorigas la sinoferon de la popolo por la sendependeco de la lando, simbolata per la blanka stelo en la centro.

Flago de Kubo estas unu el la du flagoj de nunaj socialismaj ŝtatoj (Laoso estas la alia), kiu ne uzas flagon kun komunisma simbolo.



En la ŝtata blazono la geografia pozicio de la lando, konsiderata la “ŝlosilo” de la Golfo de Meksiko inter Florido kaj Yucatàn, estas rimarkigita de la desegno en la supra parto de la ŝildo. La fasko kaj la friga ĉapo* estas tradiciaj simboloj de libereco en Latinameriko, kaj la palmo reprezentas la fekundecon de la grundo.

Kiel surprizon mi aldonas ankaŭ historiajn informojn pri la sama temo, kiujn preparis la Kuba esperantisto José de Jesús Campos Pacheco.



Flago

Post batalado je la servo de la Hispana Krono kontraŭ la liberigaj armeoj de Sud-Ameriko, Narciso López translokiĝis de sia naskiĝurbo Karakaso (Venezuelo) al Kubo. Tie lia pensmaniero ŝanĝiĝis, kio ribeligis lin kontraŭ la Krono, kiun li defendis jarojn antaŭe. Lia subteno al la revolucia afero ekziligis lin, kio implikigis lin en diversaj aktivecoj pro la sendependiĝo de Kubo.

En la jaro 1849 Narciso López troviĝis ekzilita en la usona urbo Novjorko, kie li gvidis strategiojn por eventuala ribeliĝo. Iun matenon, laŭ la legendo, Narciso ellitiĝis, rigardis ĉielen tra la fenestro kaj ekvidis la kolorojn de la mateno. “Malproksime li rimarkis triangulon de ruĝaj nuboj, kiuj anoncis la tagiĝon kaj en la triangulo brilis la Venuso (lucero aŭ lumportanto), la matenstelo, dum du blankaj nuboj disigis la triangulon, kio kreis tri blujn striojn”. Entuziasmigita pro tio, kion li ĵus vidis, López kontaktis sian amikon Miguel Teurbe Tolón, por rakonti la okazintaĵon, kiu disvolviĝis en la ĉielo. Miguel Teurbe Tolón desegnis la flagon laŭ la vizio de Narciso López kaj Emilia Teurbe Tolón, edzino de Miguel, kudris mane la flagon. La flago de la solula stelo estis interpretata sekvamaniere: La tri bluj strioj reprezentas la tri militistajn departementojn, en kiuj la insulo estis politike dividita de la Hispana Krono dum tiu epoko (Okcidento, Centro kaj Oriento). La du blankaj strioj reprezentas la purecon de ĉiuj Kubaj patriotoj. La ruĝa egallatera triangulo, kiu troviĝas maldekstre, reprezentas la sangon, elverŝitan de la patriotoj dum la sendependiĝaj militoj.

Narciso López uzis tiun flagon por plenumigi la ribeladon en la jaro 1850, kiu estis fiasko, kaj li estis ekzekutita de la hispanaj aŭtoritatoj post lia kaptado. Estis en la marborda vilaĝo Cárdenas, Matanzas la unua, kiu vidis la splendecon de la “flago de la solula stelo”, hisita la 19-an de Majo 1851 dum la konkerado de la urbo de la Kubaj ribelantoj.

Blazono

La Blazono de Kubo, konata kiel *La Palma Real*, estis kreita en 1849 fare de Miguel Teurbe Tolón — kiu kreis ankaŭ la Flagon de Kubo — je peto de Narciso López.

Tiu blazono havas formon de ŝildo kaj estas dividita je du trionoj de ties alto horizontale. En ties supra parto, nome la ĉefa, videblas maro inter du terpecoj (nome Florido kaj Jukatano), inter kiuj estas blua markolo kie videblas orkolora ŝlosilo (Kubo), kaj fone aperanta suno. Tiuj elementoj estas simboloj de la geografia kaj politika gravo de Kubo. La ŝlosilo reprezentas la enirejon de la Golfo de Meksiko. Malsupre maldekstre estas tri bluj strioj, kiuj estas simbolo de la tri tiamaj departementoj de Kubo, nome Okcidento, Centro kaj Oriento; du intermezaj blankaj strioj simbolas la purecon de la kubanoj. Malsupre dekstre staras palmo, kiel simbolo de fekundeco kaj utileco. Supre estas friga ĉapo*, kiu estas adoptita ankaŭ en aliaj politikaj blazonoj ekde la epoko de la Franca Revolucio. Blanka kvinpinta stelo estas reprezento de la sendependa ŝtato kaj de libereco. Malantaŭaj faskoj estas simbolo de la unueco de kubanoj.

Ekster la ŝildo maldekstre estas branĉo de kverko, kiu reprezentas pacon, kaj alia dekstre el laŭro, kiu reprezentas venkon.

[Ĉeti paperan aŭ e-pub-version de la libro de Cristina Bollini vi povas vizitante: www.youcanprint.it/flagoj-historio-kaj-kuriozajoj/b/5fd68326-c8db-52f2-9adb-1ab36264316e; aŭ pere de Amazon; www.amazon.it/Flagoj-Historio-kurioza%C4%B5oj-Cristina-Bollini/dp/B0B282PDNK/ref=sr_1_1?__mk_it_IT=%C3%85M%C3%85%C5%BD%C3%95%C3%91&e-ke-rid=ZDPUGKNV1ZTA&keywords=Flagoj&qid=1675710277&sprefix=flagoj%2Caps%2C177&sr=8-1]



FLAGOJ

Nia flago kaj
ĉiuj flagoj

Cristina Bollini




Kubaj legendoj

José de Jesús Campos Pacheco tradukis tri Kubajn legendojn por niaj legantoj. Vi do ekscios kial la vulturoj ne havas propran neston, kial hundoj malamas akaciajn ratojn kaj kio troviĝas fine de la mondo... Ĉeokaze vi ekkonos nacian birdon de Kubo.

Kial la vulturo ne havas neston?

La vulturoj estas pigraj bestoj. Al ili malplaĉas labori. Tiel, ili neniam plenumas siajn devojn. Oni rakontas, ke antaŭ longa tempo pluvegis dum multaj horoj en la kamparo kaj la vulturoj restis kaŝitaj inter la branĉegoj de la arboj kaj diris: *Kiam ĉesos la pluvego, ni komencos fari nestojn por niaj idaroj.*

La pluvego ĉesis kaj la vulturoj forflugis malproksimen. Ili forgesis pri la nestoj, kiuj devintus esti faritaj por protekti la idarojn pro pluvego, ŝtormo...



La sekvan tagon komencis plui denove, kaj okazis same kiel je la antaŭa tago. Tute vane! Pro tio la vulturoj laŭ la legendo ellasas ovojn inter la ŝtonoj kaj la idaroj ne havas nestojn.

Kial hundoj malamas akaciajn ratojn?

Iam bestoj organizis por si festenon, dum kiu oni povis bone trinki kaj manĝi kaj ankaŭ amuziĝi. Ĉi tiun festenon rajtis partopreni nur tiuj bestoj, kiuj havas kornojn, kiel ekzemple vir-kapro, cervo, bovo.

La feston nepre volis partopreni ankaŭ la hundo. Kiam ĝi ekvidis, ke eniras nur bestoj kun kornoj, ĝi metis sur sian kapon

artefaritajn kornojn kaj venis al la festeno. Tamen estis unu besto, la akacia rato, kiu pli frue grimpis sur proksiman arbon kaj ekvidis tiun trompon de la hundo.

Ĝi decidis dum kelka tempo trankvile observi kaj en plej bonetosa momento de la festeno ĝi ekkriis laŭte: *Inter vi estas besto kun artefaritaj kornoj!...*

La organizantoj de la festeno komencis kontroli la kornojn de la bestoj por certigi sin, ĉu la akacia rato diris la veron. Oni skuis forte la kornojn de la hundo, sed ili estis firme alfiksita kaj ne defalis de ĝia kapo.

Tiam la akacia rato denove ekkriis: *La hundo havas artefaritajn kornojn!...*

La organizantoj de la festeno denove aliris al la hundo kaj ĉi-foje ili sukcesis. La hundo estis forpelita el la festeno.

Ekde tiam la hundo malamas la akacian raton kaj ĉiam, vidante ĝin, tuj ĝin atakas, demonstrante tiel sian malamon.



La fino de la mondo

Iun tagon la tokororo (Kuba trogono, la kuba nacia birdo) demandis sin kie troviĝas la fino de la mondo kaj decidis trovi ĝin. Ĝi flugis ĝis monto, kaj tie ĝi rigardis ĉien, sed bedaŭrinde nenion trovis. La tokororo decidis inviti aliajn birdojn, kiuj vivis tie, al la kunlaboro: *Amikoj, ni trovu kune la finon de la mondo. Ĝi povas esti proksime aŭ malproksime, sed ni sukcesos en tiu ĉi afero. Ni elflugos senhalte ĝis ni trovos ĝin. Ni, do, ek!*

Ili ekflugis, sed tute vane. Tiam la ĉielo kriegis al ili: *Tion, kion vi serĉas, vi neniam trovos.*

Tamen la birdoj plu flugis... Ili atingis valon en la plej okcidenta Kuba provinco



Pinar del Rio. Tiu valo nomiĝas “Valle del Silencio” (Silenta Valo). Tie la tokororo ekrigardis ĉien kaj kiam ĝi ekvidis la bluan maron malproksime, ĝi pripensis, ke la fino de la mondo troviĝas tie, kaj ĝi konvinkis pri tio ankaŭ siajn amikojn: *Jen la fino de la mondo!*

Tiam unu el la birdoj proponis al la tokororo lasi tie signalon, por ke ĉiuj ekkonu la malkovron de la fino de la mondo. Inter la birdoj estis eta birdo, kiu havis sep kolorajn vostflugilojn, kaj ĝi desegnis belan ĉielarkon en la okcidenta regiono de la kuba insulo. Oni rakontas, ke ekde tiu tago, kiam pluvas, oni vidas ĉiam la ĉielarkon kaj tiam oni pensas, ke la fino de la mondo jam estis malkovrita.

Tokororo estas nacia birdo de Kubanoj. Ĝiaj flugiloj estas trikoloraj: ruĝa, blua kaj blanka, same kiel la koloroj de la Kuba flago. Tokororo amas liberecon kaj do ĝi reprezentas liberan animon de la Kuba nacio. La birdo, malliberigita en kaĝo, ĉesas kanti, manĝi, perdas plumaron kaj malrapide mortas.




Tokororo.

Mireille Grosjean

Kiom stultan ideon mi havis...

Ĉu tie klaki por vidi filmon?

En la stacidomo de Bielo (*Biel/Bienne*) en Svislando estas freskoj en la atendejo. Ĉiu muro ricevis freskon de la pentristo Philippe Robert en la jaro 1923.

Mi foje ricevis fotojn de tiuj artaĵoj kaj havas ilin en mia komputilo. Iam mi spektis foton de unu el la freskoj. Supre dekstre aperas blanka triangulo. Sur la ekrano de mia komputilo mi iris iom aŭtomate, sen pripensi, per mia muso por klaki, pensante, ke temas pri filmo! Fakte estas, ke en filmo kutime aperas iom centre sago, per kiu oni povas lanĉi la filmon. Tamen temis pri foto kaj la blanka tri-angulo estas volano (pilko kun plumkrono, kiun oni ĵetas per rakedoj)! 

Pri la pentristo Philippe Robert kaj lia praonklo Léopold Robert vi povas legi artikolojn en vikipedio, https://eo.wikipedia.org/wiki/Léopold_Robert. Temas pri mia familio. Sed tio ne ludas rolon en mia rakonto.





Prilingvaj pensoj de itala vilaĝano

Iom simplisme Esperanto instruas, ke italoj loĝas en Italujo kaj parolas la italan.

Fakte ĝis la dua mondmilito, pro manko de lernejo-vizitado, italoj loĝis en Italujo, sed eĉ ne komprenis la italan.

Ili parolis la sennombrajn italajn dialektojn, inter si apenaŭ kompreneblajn kaj nur eta procentaĵo de “kleruloj” parolis kaj komprenis la italan.

Pro tio floris ankaŭ poeziaj verkoj kaj kantoj en lokaj dialektoj. Neniu, ekster Italujo, eĉ imagas, ke la famega itala kanto “O sole mio” (= Mia suno) NE estas en la itala, sed en la napola dialekto.

Ĉiuokaze mi prezentas al vi tradukon de poemo en la dialekto de malgranda centr-itala vilaĝo. La aŭtoro estas Modesto Della Porta [modesto delaporta], popola poeto de abruca vilaĝo. Li naskiĝis en Guardiagrele [gùardjagrele] en 1885 kaj tie mortis en 1938. Li verkis poemojn en la loka dialekto, eldonitajn kaj ekstreme popol-ŝatatajn ankoraŭ nun, ĉar ankoraŭ nun italoj komprenas kaj povas paroli la norman italan, sed hejme preferas parolisian dialekton.



Fakosekreto

Mia amiko Ndonjo certe pravas: “kaj kuracist’ kaj pastro estre rolas ĉar unu tre misteran skribon havas kaj fremdan lingvon la dua parolas”.

Iome vin palpumas kuracisto kaj tuj preskribon skribas kvazaŭ greke, poste vi pagos al apotekisto pro la traduko, dialektobleke.

Ja ĉiam samas kuracilefiko, ja samas gust’, ŝanĝiĝas nur koloro. Se lertus ni pri greka gramatiko, ni povus zorgi meme pri preskribo por peti tiujn kaĉojn ĉe doktoro, kaj ĉesus la teroro de ĉi-skribo.

Kiam di-servas pastro tre solene aŭ litanias per kanto senfina, postzumas ni en lingvo fuŝlatina, parkere, vortomaĉe, nekomprene.

Tamen se kiel tuta la popolo parolus malbenita ĉi-fripono, alia estus tiam la kanzono, finiĝus tiam lia monopolo.

Iĝus Kajtano nia preĝkantisto, baptus la novajn bebojn sen tarifo; kaj nur pripensu Ndonjon la miopan, jardekojn estis li preĝservisto, se por li estus klara la signifo, li rangon havus nun jam episkopan.

PS: la nomoj estas esperantigitaj laŭ la loka dialekto. Ndonjo en la itala estas Antonio [antonjo], kaj Kaajtano = Gaetano [gaetano].

Renato Corsetti

Andantino **'O sole mio** E.di Capua

1. Che bel - la
2. Quen - no fa

Jasmine Huang

Apro – ĉu sovaĝa besto?

Se vi regule legas Junan Amikon, vi rimarkis, en artikolo pri grotoj, ke niaj praavoj desegnis aprojn sur murojn antaŭ jarmiloj.

Tiam ili ĉasi tiujn sovaĝajn bestojn por manĝi. Sed same kiel ursoj en la usonaj bestrezervejoj, kiuj ne plu timas alproksimiĝi al la homoj, same aproj en suda Francio preskaŭ “amikigiĝas” kun ni.

Apro estas sovaĝa porko, kiu vivis en Barato antaŭ 40 milionoj da jaroj. En tiu epoko elefantoj kaj gigantaj cervoj libere vagadis en arbaroj kaj kapablis adaptiĝi al la klimatsanĝoj. Ankaŭ aproj adaptiĝis: ili grandiĝis, la kapo iĝis pli granda kaj la dentoj kreskis, fariĝis dentegoj. Tio permesis al ili prifosi la grundon, por trovi manĝaĵojn (vermoj, insektoj, cepoj, radikoj, ratoj, glanoj, beroj, ktp.) Nur maskloj havas dentegojn, sed ĉiuj havas fortikan oston ĉe la nazo, por fosi la grundon.

Apro ne vivas sola, sed en familio, kun hierarkio. Se mortas aprino (kiu naskas de 4 ĝis 7 apridojn 1- aŭ 2-foje jare), alia aprino (onklino, fratino, kuzino de la mortinta aprino) adoptas la orfojn!

La subhaŭto estas kovrita de graso, por protekti la beston kontraŭ malvarmo, kaj de dikaj, longaj haroj, kiuj permesas al la apro kaŝiĝi en dornaj arbustoj kaj ne vundiĝi. Kiel porko, ĝi ŝatas “purigi” la



haŭton per koto, kaj kiam la koto sekiĝis, kombi sin ĉe arbotrunkoj.

Aproj bezonas grandajn areojn por kuri, ĉasi, ripozi kaj manĝi. Sed homoj nun vivas en arbaroj, konstruis domojn eĉ domarojn en “sovaĝaj” lokoj. Tio okazis ĉe mi, en suda Francio. Kiam mi estis infano, mi vidis unu apron jare, nun ili instaligiĝis sur nia tereno kaj ne plu timas.

Mi rakontos al vi anekdotojn. Unu someran tagon mi trankvile legis en pinarbaro. Tiam mi aŭdas flustrojn kaj komprenis, ke temas pri aproj (fakte familio: aprino kaj 4 idoj). Mi do senbrue forlasis la arbaron kaj restis sur mia teraso. Post momento, kvar ŝtupojn sube, aperis aprino, kvazaŭ ridetanta, kiu venis por sin prezenti. Ŝi rigardas min, mi rigardas ŝin, kaj post momento ŝi venis kun kvar apridoj, por ke ni konatiĝu !

Alian tagon mi revenis aŭte, ŝi trakuris la vojon kaj trankvile kuŝiĝis, por mamnutri siajn idojn! Mi elŝaltis la motoron kaj atendis la finon de la mamnutrado, dum 3 pli aĝaj (adoptitaj) apridoj apude vagadis.

Tiun someron ĉinaj esperantistoj vizitis min. Nia 12-homa kompanio vespermanĝis, babilis ktp., kiam ni aŭdis bruon: jen la apra familio alvenis. Ĉiuj fotis, pensante, ke estas kvar aproj, sed sur la fotoj aperis sep!

Kunvivado: eĉ se mi aprezas pladon el apraĵo, mi ĝis nun ne sukcesis manĝi ĝin! La aproj regule vizitas mian bienon, formanĝas legomŝelojn, kiujn mi ĵetis por kompostado, elterigas la plantojn, kiujn mi plantis (mi konstatis, ke ili estas mallaboremaj: ili fosas tie, kie la grundo estas mola). Ili plugas la terenon, kie mi plantis legomojn, akvumis, prizorgis ilin... – kaj la aproj ĉion formanĝas. Nun mi rekte ĵetas al ili malbonajn terpomojn, ne plu plantas ilin.

Aproj naĝas en la mediteranea maro aŭ en naĝejoj (mi ne havas). Nur ursoj, lupoj aŭ tigroj timigus la junajn apridojn... Mi rezignis kunvivi, lasis al ili iom el mia natura bieno, dum najbaroj konstruigis 2,5 metrojn altajn murojn.

Renée Triole



Toskanio de la kuirarta flanko 2

La tuta Toskanio estas preskaŭ vinberejoj kaj olivarbejoj. Oni taksas, ke ekzistas proksimume 15 milionoj da olivarboj en tiu regiono.

Olivoleo estas uzata en preskaŭ ĉiu plado. La plej altkvalita olivoleo havas la subskribon I.G.P. - *Indicazione Geografica Protetta* (t.e. Protektita Geografia Indiko). Homero nomis olivoleon la ora likvaĵo.

La **vinberejoj** de Toskanio estas konataj tra la tuta mondo. Ili ekzistas ekde la etruskaj tempoj. La tradicio de kultivado de vitoj (aŭ: vinberarboj) estas vere tre longa. Inter la vinoj oni devas mencii: Brunello di Montalcino, Carmignano, Chianti, Morellino di Scansano, Vernaccia di San Gimignano, Vin Santo, ktp. Laŭ la tradicio, toskanaj cantuccini-kuketoj estas trempitaj en Vin Santo vino.

La **Garfagnana**-regiono estas konata pro **farro**, ameltritiko*. Oni preparas el ĝi varmigitan supon aŭ manĝas ĝin malvarme kun salato, tomato, olivoj kaj kun aliaj nekuiritaj legomoj (inkluzive kun celerio, ofte trovita en ĉi tiu regiona kuirarto). La urboj **Sorana** kaj **Bigliolo** en Lunigiana-teritorio estas konataj interalie pro kultivado de fazeolo. En antikvaj tempoj, kamparanoj ne manĝis ĉasaĵon



Toskana vinberejo.

kiel la riĉuloj, do ili spicis la fazeolon kvazaŭ ĝi estus ĉasaĵo. Ili nomis tiun pladon "*fagioli all'uccelletto*". Fazeolo aperis en Italio post la jaro 1492, kiam Ameriko estis malkovrita. Tiam Florenco estis ege potenca ŝtato, kaj novaj produktoj alvenis el la tuta mondo. La fazeolon alportis al Florenco la papo Klemento la 8-a.

En Toskanio, kompreneble, ne povas manki dolĉaĵoj. **Cantuccini**, ankaŭ nomitaj cantucci, estas konataj ĉie en la mondo. En la tradicia versio, la kuketoj estas migdalaj kaj malmolaj, kaj ili estas trempitaj en la toskana vino *Vin Santo*. Kadre de la kristnaska festo en la vendejoj aperas ricciarelli, brutti ma buoni kaj **panforte**. Preskaŭ ĉiu urbo havas iun tradician kukon aŭ kuketojn. **Brigidini**, anizokuketoj, estas produktitaj en Lamporecchio. **Buccellato** venas de Lukka, antaŭ longa tempo ĝi estis manĝata nur la 14-an de Septembro, en la Tago de la Laŭdego de Sankta Kruco kaj dum Palio en Septembro. **Castagnaccio** estas atribuita al la urboj situantaj en la montoj, ĉar tie estas kolektitaj kaŝtanoj, kiuj poste estas ŝanĝitaj en, interalie, kaŝtanfarunon. Oni devas mencii pri **necci**, la krespoj el kaŝtanfaruno plenigitaj per *ricotta* aŭ *Nutella*. Dum karnavalo, oni fritas **cenci** (simila al pola *faworki* – kuko fritita en densa oleo aŭ en ŝmalco, fandita kaj mola



Olivoj sur olivarbo.





bestograso) kaj **frittelle di riso**. Dum Pasko estas bakita **schiacciata di Pasqua**, kiu estas populara en Pizo kaj Livorno. En Siena populara estas kuko kun mielo kaj nuksoj kaj nomiĝas **melatello**. Alia dolĉaĵo estas **pandiramerino**, bulko kun rosmareno kaj sekvinberoj, preparita antaŭ ĉio dum Kareismo. **Scarpaccia viaregina** devenas de Viareggio, al la pasto oni donas kukurbeton. **Sfratti** havas radikojn en juda kuirarto, ĝi devenas de Pitigliano, la urbo kie antaŭ longa tempo loĝis multaj judoj.

Toskanio estas vizitinda pro siaj monumentoj kaj belaj urboj riĉaj je arto, historio kaj tradicio. Mi ankaŭ rekomendas ekkoni ĉi tiun regionon laŭ la kuirarto, iri al loka restoracio **trattoria** (itala kuirado) aŭ viziti unu el la vinberejoj ligitaj kun gustumado de vino kaj olivoleo.

Aleksandra Seghi – estas italistino, ĵurnalistino, redaktorino de la portalo “Poloj en Italio” (www.polacywewloszech.com). Ŝi kunlaboras kun polaj gazetoj, por kiuj ŝi verkas artikolojn pri toskana aŭ itala kuirarto kaj estas la aŭtorino de la dek libroj pri italaj temoj, precipe toskanaj. Aleksandra Seghi skribas en sia kuirarta kaj vojaĝa blogo “Moja Toskania” (www.aleksandrasedghi.com) dum 13 jaroj. Ŝi estas tradukistino, organizas vojaĝajn kaj kuirartajn renkontiĝojn kaj kuirlaborejojn en Toskanio.

* *Triticum turgidum subsp. dicoccon* aŭ ameltritiko estas subspecio de durum-

tritiko, kiu hodiaŭ ne havas komercan signifon, sed gravas pro genetiko. Ĝin uzis la egiptoj ĝis alveno de la greka okupo, post tio ili ŝanĝis ĝin al durumto (<https://eo.wikipedia.org/wiki/Durum-tritiko>). La faruno estas riĉa je amelo. Vidu ankaŭ: https://eo.wikipedia.org/wiki/Triticum_turgidum_subsp_dicoccon

Aleksandra Seghi



Vinberejo aŭtune.

PLEJ LASTEMPAJ ARTIKOLOJ

Teraso Mascagni en Livorno
Abisita de Aleksandra Seghi la 6-an de novembro 2023 en Mia Toskanio | 0 komentoj
 Unu el la plej belaj observferdejoj en Italio estas la Teraso Mascagni. Kaj ne temas nur pri...

Itala Skermado-Konkurado en Montecatini Terme
Abisita de Aleksandra Seghi la 5-an de novembro 2023 en Mia Toskanio | 0 komentoj
 Ĉi-semajnfine okazis en Montecatini Terme la Nacia Skermado-Konkurado. Ĝis nun mi havis la plezuron...


Intervjuo kun mi. Serio de artikoloj titolita VIRINŬJ KUN ĈAPITALO F, POLAJ VIRININOJ EN ITALIO NE ĈIAM SUNOJ.
Abisita de Aleksandra Seghi la 4-an de novembro 2023 en Moja Toskania, Moja Toskanio en radio kaj televido | 0 komentoj
 Hieraŭ mi publikigis intervjuon malfermantan serion da artikoloj de ĵurnalistino Ewa Trzcinska titolita...

Toskanio sub akvo
Abisita de Aleksandra Seghi la 3-an de novembro 2023 en Mia Toskanio | 0 komentoj
 Karaj amikoj, Hieraŭ ni havis la plej malbonan pluvan tagon. Areoj: Florenco/Prato/Pistoia kaj poste...



Preparado de krespoj.





Rubrikestro:
Elena Nadikova,
la gvidantino
de Esperanto-klubo
“Betuleto”, Rusio.
lena_espereo@mail.ru



Esperanto-Plaĝo

Saluton, karaj legantoj!

Interkultura Mondo gratulas
vin okaze de alveninta Nova
Jaro! Ni deziras sanon, pacon kaj
prosperon al ĉiuj popoloj tra nia
granda planedo!

E speranto-komunumo unuigas
homojn, kiuj ŝatas nian internacian
lingvon. Ĉiuj scias, ke lernado
de lingvo estas granda laboro. Tamen
Esperantujo estas neordinara lando. Ĉu
vi kredos, karaj legantoj, se ni diros, ke
eblas unuigi seriozan laboron kun feria
ĝuado? Ne? Ek al nia rakonto!

Ni transportos vin al Hispanio, al la
ĉarma turista urbeto Cullera. Tie ĉe la
Mediterranea bordo en 2019 aperis...
Esperanto-Plaĝo. Jes, vera plaĝo kun
maro, sablo kaj Esperanto. Sed kiel
tio eblas? Pri tio rakontos mondfama
Esperanto-instruisto, aktivulo Dennis
Keefe:

“Homoj tra la tuta mondo lernas
Esperanton, utiligante la plej diversajn
manierojn. Kelkaj aĉetas libron kune

kun vortaro. Aliaj ĉeestas kurson en sia
urbo, en loka lernejo aŭ kultura centro.
Multaj homoj en la lastaj jaroj faras
lecionojn ĉiutage en la retejo Duolingo.
Estas eĉ novaj lernantoj, kiuj studas
Esperanton per la mesaĝilo Telegramo
kaj sia poŝtelefono. Kaj estas manpleno
da homoj, kiuj eklernas, plilernas
Esperanton per tre longa restado sur
la plaĝo en la mediterranea marbordo.
Tia studado, tiu nova maniero, nomiĝas
Esperanto-Plaĝo.

Esperanto-Plaĝo estas evoluo,
disvolvigo de la tre intensaj (inter 6
kaj 8 horoj ĉiutage), longdaŭraj kursoj
(ĝis 1- 2-monatoj), kiujn mi originale
verkis en 1988 kaj 1989. Unue, estis la
8-taga, 64-hora BEK-Kurso en la Liceo de
Esperanto en Hispanio. Poste mi havis
bonan ŝancon instrui la saman kurson en
la Kastelo de Gresillon en Francio. Tie mi
instruis la BEK-Kurson dum tri semajnoj,
ses horojn ĉiutage, entute iom pli ol
100 horojn. Tamen, mi ne plu instruis
en tiaj longegaj kursoj dum jardekoj,
ĝis mi laboris en Ĉinio, kie mi lanĉis la
projekton Esperanto-Insulo – ne plaĝo,




La plaĝo Cullera.





insulo – en la jaro 2010. Kial insulo? Kial plaĝo? Tutsimple ĉar tiaj estis la lokoj, kie la lernado de Esperanto okazis. En Ĉinio ni estis sur la plej suda, granda insulo, nomata Hai Nan Dao. Rigardu en mapo. Vi vidos ĝin ne malproksime de Vjetnamio. Aliflanke, Esperanto-Plaĝo troviĝas ĉe la mediteranea marbordo en Hispanio, en Valencio, en la turista urbeto Cullera. Ĉinio estis projekto, kiu ripetiĝis kvarfoje, kaj ĝis nun, la kurso en Hispanio, kiu fakte estas en naskiĝo-periodo, havis nur du sesiojn. Baldaŭ tri.

La ĉefaj trajtoj de Esperanto-Plaĝo estas du: Unue, ĝi estas tre, tre intensa. La lernanto aŭdas, parolas, legas kaj skribas Esperanton ok horojn ĉiutage. Kaj due, ĝi estas tre longdaŭra, ne ok tagoj kiel en Madrido, nek tri semajnoj kiel en Francio, nek unu kompleta monato kiel en Ĉinio. Esperanto-Plaĝo longas du monatojn de la 1-a de Aprilo ĝis la 31-a de Majo – 61 tagojn! Iom da matematiko: se vi sumas la kvanton da horoj laŭ nia kurso-kalendaro, vi havas en Aprilo 26 kurso-tagojn kun 8 leciono-horoj ĉiutage, do



BEK-materialo.



Ekskurso, kafo-kunveno en Valencio.

208 lerno-horojn. En Majo nur 21 kurso-tagojn kun nur 4 horoj ĉiutage, do 88 lerno-horojn. Entute 292 enlecionaj horoj por Esperanto-Plaĝo. Kiel dirite: intensa, longdaŭra!

La kurso-enhavo dividiĝas en du periodojn. La celo de la unua parto, en Aprilo, estas bone LERNI la lingvon, kaj la celo de la dua parto, en Majo, estas UZI la lingvon. En Aprilo la lernanto intense lernas la gramatikon de Esperanto, la ĝustan prononcadon, relative grandan vortstokon, kune kun la tuta sistemo de prefiksoj kaj sufiksoj de Esperanto. La lernanto faras tion, studante, aŭskultante, legante kaj skribante. En tiu intensa kaj longa Aprilo, la gelernantoj, tamen, ne lernas ĉiujn detalojn de la gramatiko, sed sufiĉe por trairi A1, B1 kaj B2, kune kun pluraj partoj de la C-nivelo de la eŭropa skalo de lingvo-ekzameno. Duono de la studo-materialo, se vi volas



BEK-kurso, materialo.



ekvidi ĝin, troviĝas en la ekzercaro nomata BEK (Baza Esperanto-Kursaro) ĉe www.bekkurso.info. Esperanto-Plaĝo uzas modifitan version de tio.

En la dua parto, en Majo, aliflanke, la lernanto preskaŭ neniam parolas pri gramatiko, sed diskutas kaj debatas pri literaturo, pri mondaj eventoj, pri artikoloj de Vikipedio. Ekzemple, lastjare ni legis kaj poste pristudis verkojn de Claude Piron (ne *Gerda Malaperis*, ĉar tro simpla), verkojn de Hans Christian Andersen, Zamenhof kaj multajn aliajn. Krome, ĉiu lernanto, ĉiutage en Majo faras etan prelegon (ne legatan!) de kelkaj minutoj pri iu ajn temo, kiu povas esti plej varia: Krokodiloj en Sudameriko; Miaj Geavoj; La Lastaj Visigotoj en Hispanio; Bitmonero; Mozarto; Mia Hobio; La Homa Cerbo; Nigraj Truoj en la Universo; Mia Kato; La Vivo de Zamenhof, ktp. Aldone al tio estas multaj taskoj de skribado-verkado.

Ne nur estas kursoj. Esperanto-Plaĝo



estas en bela loko kaj ni profitas la okazon por ofte plaĝo-promeni kune, manĝi kune, kafumi kune, tagvojaĝi kune. En Aprilo ni ekskursas unufoje ĉiusemajne kaj en Majo dufoje. Ĉiam parolante Esperanton. Muzeoj, UNESKO-monumentoj, parkoj, interesaj kafejoj, tradiciaj manĝejoj, botanikaj ĝardenoj, naturaj akvo-parkoj, vilaĝoj de esperantistoj: la listo estas longa.

Lernantoj de Esperanto-Plaĝo estas diversaj, sed ni ĉiam klopodas havi homojn el malsamaj landopartoj. En la unua jaro: el Japanio, Ĉinio kaj Koreio. En la dua: el Francio, Svislando, Ĉinio kaj Hispanio. Ni ĉiam volas havi lernantojn el almenaŭ du kontinentoj. Tamen, sci, ke Esperanto-Plaĝo estas tute en siaj naskiĝo-momentoj. Estis ĝis nun nur manpleno da gelernantoj. Multe da landoj, jes ja, sed nur tri en la unua jaro, kaj kvin en la lasta. Rilate lingvo-nivelon,





kelkaj lernantoj estas komencantoj, sed kelkaj jam studis iom da Esperanto, tamen ne sufiĉe bone uzas la gramatikon kaj vortojn, kiujn ili antaŭe enkapigis.

Esperanto-Insulo de Ĉinio, kaj Esperanto-Plaĝo de Hispanio montras, ke eblas kunigi lernantojn de malsamaj lingvofamilioj, kaj eblas instrui al ili dum tre intensa, tre longa periodo. En la estonteco ni esperas, ke alvenos eĉ instruistoj de Esperanto, ne por lerni Esperanton, kompreneble, sed por pli lerni kiel instrui intense kaj longdaŭre. Instrui kaj lerni ok horojn ĉiutage ne evidentas; instrui kaj lerni dum du plenaj monatoj ankaŭ ne. Tamen eblas, kaj la projektoj en Ĉinio kaj Hispanio montris, ke ekzistas ia vojo.

En la estonteco eble ekzistos pli ol unu Esperanto-Plaĝo. Ĉu Esperanto-Tahitio, aŭ Esperanto-Afriko, aŭ Esperanto-Montaro, aŭ Esperanto-Fjordo, aŭ Esperanto-Romo, Esperanto-Bialistoko? En ĉiu regiono, ĉu eblas belloka, alloga, intensa, longdaŭra Esperanto-Oazo? Ĉu Esperanto-Espero?"

– Jes, nepre! – kredas kaj konfirmas Interkultura Mondo! Eblos Esperanto-mondo, kie aperados Esperanto-montoj, lagoj, maroj, urboj kaj landoj! Ja nia lingvo servas al justeco, egaleco kaj bono por ĉiuj homoj en ĉiuj lokoj.

Esperanto-Espero gvidos nin al Esperanto-Mondo kun Esperanto-Paco!

Interkultura Mondo esprimas koran dankon al nia samideano Dennis Keefe



Monto malantaŭ nia kurso.

pro la disponigitaj materialoj kaj invitas ĉiujn viziti la du Esperanto-Plaĝojn: la ĉiujaran en Valencio, Hispanio kaj la ĉi-jaran en Maceió, Brazilo (2024/07/2–27). Vidu ĉe www.ilei.info


Por lernemuloj:

Nivelo 1. Rerakontu la tekston (ĝian parton) laŭ la alineoj.

Nivelo 2. Respondu la demandojn:

1. Kie kaj kiam okazis Esperanto-insulo?
2. Kiel nomiĝas la loko de Esperanto-plaĝo?
3. Nomu du ĉefajn trajtojn de Esperanto-plaĝo.
4. El kiom da partoj konsistas Esperanto-plaĝo?
5. Kia estas “feria” konsisto de Esperanto-plaĝo?

Nivelo 3. Rakontu, kiel vi lernis/lernas Esperanton.



Naĝejoj de nia loĝejo.



Ĉokolado: dolĉaĵo por vi, ekspluatado de afrikaj infanoj

Kiu el vi ne ŝatas ĉokoladon?
Nigran, blankan, kun lakto...

Ĉokolado

Vi trinkas ĝin varman, manĝas bombonojn, trovas ĝin en diversaj kukoj. Ĉu vi konsciis, ke en Afriko infanoj devas labori en malfacilaj kondiĉoj por regali vin?!

Iom da historio

Oni scias, ke 5300 jarojn antaŭ Kristo, ĉokolado estis konata en sud-Ameriko de Olmekoj, Majaoj, Aztekoj. Ili trinkis ĝin, sed ankaŭ uzis kiel monunuon, aŭ dum religiaj ceremonioj. Ĉokolado alvenis en Eŭropon en la 19-a jarcento: tiam nur princoj en Hispanio aŭ Francio, aŭ riĉuloj konsumis ĝin.




Malfacila kultivado

Ĉokolado venas el faboj de arbusto, nomata kakaoarbo. Ĝi nature kreskis en humida arbaro, origine en Latin-Ameriko, kiu nun produktas 18% de kakao-faboj. 6% de kakao produktiĝas en Azio, sed ĉefe Afriko produktas 76% de la monda produktado.



Kakaoarbo.



Fruktoj de kakaoarbo.



Kakaaj fruktoj kun semoj.

Unue necesas senarbigi grandajn surfacojn, t.e. forhaki arbojn, bruligi herbaĉojn, plugi, fosi truojn. Apenaŭ restas tempo por kultivi sian kampon, por produkti manĝaĵojn, sekve afrikanoj devas aĉeti tion, kion ili manĝas, dum antaŭe ili produktis en la vilaĝo tion, kion ili bezonas por nutri sin.

Ekspluatado de kultivistoj

En 2021 ĉokolad-industrio perlaboris 100 miliardojn da dolaroj, sed nur 6% iris al la produktantaj landoj (Ebura Bordo, Ganao, Gabono, Kameruno, ktp). Malgrandaj 2% iras al la kultivistoj (infanoj, aŭ aliaj, kiuj ricevas mizeran salajron por intensiva kaj malfacila laboro). Se en Svislando, Francio, Belgio kaj Italio averaĝe ĉiu konsumas 10 kilogramojn da ĉokolado jare, Afriko konsumas nur 4% de la monda produktado.

Ni aldonu, ke apud la senarbigo, mal-bona por la planedo, regas poluo de la grundo pro aldono de kemiaj sterkajoj kaj poluo de aero pro transporto de la faboj. Eĉ se mondaj firmaoj havas bonan konsciencan, pagante iom pli al la kultivistoj, aŭ plantante aliajn arbojn, la rezulto estas malekvilibra kaj nejusta.

Bonan apetiton! **Renée Triolle**

Krucenigmo

La solvon bv. sendi al:
redakcio@gmail.com.

Unu el la solvintoj (decidos loto) ricevos donace la verkon "107 krucenigmoj en Esperanto" de la aŭtoro Stano Marček.



	UNUA PARTO DE LA KAŜFAZAO		SIMBOLO DE BORO	PARTICIPA SUFIKSO	VI KAJ MI	SOLO EN OPERO	PIONIRO DE SAT	DUA PARTO DE LA KAŜFAZAO
ADVERBA FINAJO		ORDINARE TRIVIALE FORTE EKSCITU, KOLERIGU						
PROKSIMIGA PARTIKULO			DESPOT'	RILATA AL ORIENTA POPOLO				
ANTAŭHISTORIA, PRIMITIVA					LIKV' EN SKRIBILO POLV' SUR FLORO			
ANTIKVA KORD-INSTRUMENT'				RILATA AL KUIRVAZO KEMIAJ (C,H,O)				
DISTANCO INTER HALILOKJOJ						SKARAB' SUB LIGNA ŜELO DIREKTI		
FEST' ĈE RONDA DATREVENO							TUNO LAŬ TIA MANIERO	
SIMBOLO DE REZISTANCO		MAL-LIBERIGI KAMP' TERRITORI'						
EKSPERIMENTA SUFIKSO			KARIB-MARA INSULAR' FIKSA IDE'					
ZAMENHOFAN E-OBJEKTON					EGIPTA SUN-DIO NEKONSONANT'			
LIGNECA PLANT'				LITOVA ĈEFURB' SIDEJO DE SENTOJ				
FLAV-NIGRA PIKANTA INSEKTO						E-ISTA FEDERACIO SEKVI ORDONOJN		
GRAVA ORGANIZO DE UN							SIMB. DE AMPERO ORKOLORE	
LITRO		LUDIL' SUR SNURO SUFIKSO (frakcio)						
DISTRIBU PREPOZICIO			EDUKITA, INSTRUITA ROMANE „500"					
LEVIĜANTA AKVOMASO					„DE IU"			

La norda pinto

Ni atingis la gravan urbon en 26-jaroj da vivado en Nov-Zelando, mi nur unufoje eniris Nordlandon, kaj tio por la landa Esperanto-Kongreso en Whangārei en la sesdekaj jaroj.

Ni tien vojaĝis per kvartaga aŭto-karavano de la ĉefurbo Velingtono (*Wellington*) ĝis la fora nordo. Tion faris la junuloj en EJANZ, la landa sekcio de TEJO. Kial kvartaga vojaĝo? Unue, ni haltis ofte, kaj niaj kvar aŭtoj ne estis en brila stato.

Iuj aventuruloj strebis tra la jaroj atingi la nordan poluson. Por ni, la simila lukto estas atingi la plej nordan pinton de Nov-Zelando – Kabo Rēinga. Kial


La rubrikon
prizorgas:
Stefan MacGill



maoria nomo? Unue, en Nordlando vivas multaj maorioj, due laŭ la maoria kredo, tiu plej norda pinto de la mondo konata al ili estas la desalto-punkto por tiuj, kiuj finis sian vivon en ĉi tiu mondo, por transiri al la sekva.

Nia vojaĝo al la norda pinto okazis en la komenco de 2020, ĵus antaŭ la alveno





ja ĝuis la belan spektaklon. Kompreneble, la buso mem kunportis tiujn glit-bretojn. La nov-zelanda turismo antaŭvidas ĉion!

Ĉu ni ne famiĝis pro la perŝnura elsaltado **bunĝo**?

La apuda foto montras la marbordon, kiam oni proksimiĝas al la plej norda punkto.

La unua foto (p. 37) montras la lumturon super la plej norda pinto de Nov-Zelando.

de la pandemio. Unue, ni povus veturi per propra aŭto ĝis Kaitaia, kie necesis ŝanĝi al fortika modifita kamion-buso, kiu kapablos superi la sablajn plaĝojn de tiu norda pinto. La buso ebligis unutagan ekskurson.

La dua foto montras tiun buson, kun adaptoj al la pneŭmoj, por povi veturi sur sablaj plaĝoj.

Dum la aventuro la buso haltis ĉe altegaj sablomontoj, tiel ke la pasaĝeroj iĝu sportistoj.

Vidu la apudan bildon. Per glit-bretoj ili povis grimpi supren kaj glitiri suben.

Tiuj el ni en iom pli alta aĝo ne glitis, sed

La suba foto montras la sablomontan glitanton en la norda pinto de Nov-



Zelando, Kabo Rēinga. Irante norden de tie estas multaj miloj da kilometroj de oceano.

Vort-klarigoj:

Adaptoj: Modifoj. **Kabo:**


Landparto, kiu montras kaj eniras maron aŭ lagon.

Pneŭmoj: Kaŭĉukaj radringoj sur veturilo. **Bunĝo-saltado:**

Timiga saltado suben, savita per elasta rimeno: La 'sporto' naskiĝis en pacifikaj insuloj inter indiĝenoj, sed Nov-Zelando adaptis ĝin kiel turisto-altiran sporton.



La sablomonta glitanto.



Landaj Rezentantoj – Perantoj de *Juna Amiko*

Aŭstralio: Aŭstralia Esperanto-Asocio, G. P. O. Box 2122 Melbourne 3001; *info@esperanto.org.au*. **Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg; *aon.913548977@aon.at*. **Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekenstraat 169, BE-2000 Antwerpen; *financo@fel.esperanto.be*. **Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Bl. P 36, Ed. Venâncio III, sala 303, BR 70393-902 Brasília-DF; *belabutiko@esperanto.org.br*. **Britio:** Esperanto Association of Britain, Esperanto House, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE; *eab@esperanto.org.uk*. **Bulgario:** Mariana P. Evlogieva, PK 973, BG-1000 Sofia; *mrvp@interpres.org*; *ilei@espereto.com*. **Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-290 01 Poděbrady III.; *polnickypavel@seznam.cz*; *cea.polnickyy@quick.cz*. **Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla 231 Curico; *strigo@esperanto.cl*. **Ĉinio:** Gong Xiaofeng, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, Nanchang, CN-330031; *arko.gong@qq.com*. **Danio:** Arne Casper, Bryggervangen 70 4 tv, DK-2100 København; *arnecasper@yahoo.com*. **Estonio:** Ahto Siimson, Russa tee 2, Liu, Audru vald, EE-88302 Pärnumaa; *ahto.siimson@esperanto.ee*. **Finnlando:** Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 as 10, FI-28430 Pori; *paula.niinikorpi@gmail.com*. **Francio:** Saïd Balouchi, *said.balouchi@esperanto-france.org*. **Germanio:** Esperanto-Buchversand, Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, DE-55129 Mainz; *wolfgang.schwanzner@esperanto.de*. **Germanio:** Zsófia Kóródy, Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz; *zsofia.korody@esperanto.de*. **Hispanio:** Pedro Garrote, Apartado 119 Esperanto, ES-47080 Valladolid; Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell, *sandra@esperanto.cat*. **Hungario:** József Németh, Fo u. 41/5, HU-8531 Ihász; *jozefo.nemeth@gmail.com* (por superaj membroj de ILEI); Stefan MacGill; *stefan.macgill@gmail.com* (por simplaj abonoj). **Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, Skolavorðustigur 6B, IS-101 Reykjavík; *esperanto@isl.is*. **Israelo:** Gian Piero Savio, Rehov Menora 13/4, IL-5349007 Givatajim; *saviogp@netvision.net.il*; *esperantisto@live.com*. **Italio:** Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43122 Parma; *esperoenparmo2020@yahoo.com*. **Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Japana filio de ILE, JP-162-0042 Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3; *esperanto@jei.or.jp*. **Koreio:** 464 Ho, Toegye-ro 217, Jung-gu Seoul, KR-04558, Republic of Korea, Korea Esperanto-Asocio, K-filio de ILEI, *www.esperanto.or.kr*, *kea@saluton.net*. **Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb; *marija@hes-keu.hr*. **Kubo:** Kuba Esperanto-Asocio, Apartado Postal 5120, CU-10500 La Habana 2. **Litovio:** Litovia Esperanto-Asocio, ab/k 167, LT-3000 Kaunas; *irenaa@takas.lt*. **Nov-Zelando:** David Ryan, PO Box 3867, Wellington 6140, *ryangomez@extra.co.nz*. **Pakistano:** Jawaid Eahsan, P.O. Box 26, PK-60000 Multan. **Pollando:** Magdalena Tatara, Grzegorzeczka 74/4, PL-31-559 Kraków; *mtatara@gmail.com*. **Portugalio:** Portugala Esperanto-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6, R/C A, PT-1500 Lisboa; *asocio@esperanto.pt*. **Rumanio:** Ioan Crâncău, B-dul București 5/53, RO-430281 Baia Mare. **Rusio:** Halina Gorecka, ab. ja. 1205, RU-236039 Kaliningrad; *sezonoj@mail.ru*. **Slovakio:** Peter Baláž, Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske; *petro@ikso.net*. **Slovenio:** Višnja Branković, Via Parini 5 IT-34 129 Trieste. **Sud-Afriko:** Colin Beckford, C2 Plaza Hill 3, Bower Road, ZA-7800 Wynberg. **Svedio:** Sten Svenonius, *fidinda@outlook.com*. **Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedom 6, CH-4224 Nenzlingen; *ch_scheidegger@bluwin.ch*. **Tajvano:** Reza Kheirkhah, No. 105, Chung Ching Road, Pingtung, 900-73; *rezamenhof@yahoo.com*. **Togo:** Koffi Gbeglo, B. P. 13169, Lome; *esp.togo@cafe.tg*. **Usono:** Esperanto-USA, 91-J Auburn St #1248, Portland ME 04103; *eusa@esperanto-usa.org*. **Por vidhandikapuloj:** Vjačeslav Suslov; *gloro59@yandex.ru*. **Mendojn eblas sendi ankaŭ al** *ilei.abonoj@gmail.com*.

Se ni foriros , ili sukcesos atingi la gorĝon kaj Tito malsaniĝos.

Liĉjo, kien vi iras?

Vi povas foriri, sed mi ne foriros ĉar mi havas ideon.

Kapitulacu!

Mi devas sukcesi.

Mi sukcesis!

CLICK

Terno. Nur se estus urĝe.

Atttĉiss.

Sanon.

Helpon!

Nia organismo estis savita de la virusoj dank' al la kuraĝo de Liĉjo.

Ne tro feliĉu...

...ĉar ni serĉos ĉelon kaj ĝi estos infektota kaj niaj fiaj amikoj estos venĝitaj.

GRRRR!